

WINTER
NACIA
MOND
LITERATURO

EDWARD PISKORSKI
Piekary Śląskie
ul. Buczka 50, szk. nr 4
Polska

AUGUST
STRINDBERG:
INSULO
DE FELIĈULOJ

FERDINAND
HIRT & SOHN
LEIPZIG
ESPERANTO-FAKO

Internacia
Mondliteraturo

Volume 17

EDWARD PISKORSKI
Piekary Śląskie
ul. Buczka 50. szk. nr 4
Polska

INTERNACIA MONDLITERATURO

Kolekto de la plej famaj verkoj
el ĉiuj naciaj literaturoj



FERDINAND HIRT & SOHN EN LEIPZIG / 1926
ESPERANTO-FAKO


AUGUST STRINDBERG

INSULO
DE FELIĈULOJ

El la sveda originalo tradukis

Oskar Frode

Fil. mag.



FERDINAND HIRT & SOHN EN LEIPZIG / 1926
ESPERANTO-FAKO

ĈIUJ RAJTOJ ESTAS REZERVATAJ
COPYRIGHT 1926 BY FERDINAND HIRT & SOHN
MADE IN GERMANY

Esper. 78 I



U-1121 00

PRESEJO BREITKOPF & HÄRTEL, LEIPZIG

2411599/61

ANTAŬPAROLO

August Strindberg, kies vivtempo ampleksas la jarojn de 1849 ĝis 1912, estas la plej eminenta reprezentanto de la realisme-naturalisme akcentata stilo en la sveda literaturo, kiu aperis je la fino de la deknaŭa jarcento. Multaj liaj verkoj karakteriziĝas per senkompatate esprimita kritiko de la estantaj sociaj aferoj, kaj sekve de tiaj revoluciemaj tendencoj li fariĝis la aŭtoro plej ŝatata de la svedaj laboristoj-socialistoj. La Strindberg-a stilo ofte estas malmodera kaj eĉ brutaj; tio eble plej ofte okazas koncerne liajn senkompatajn atakojn kontraŭ la virinaro. Malmultajn aŭtorojn oni taksis tiel malsame kiel Strindberg-on. Plej ŝatata li fariĝis kiel dramverkisto kaj aŭtoro de romanoj kaj noveloj.

El la longa vico de la verkoj de Strindberg oni memoru unue liajn du plej bone ŝatatajn historiajn dramojn *Mäster Olof* (Majstro Olov) kaj *Gustaf Wasa*. *Mäster Olof* estas la verko, per kiu li unue akiris reputacion literaturan. Ĝia ĉefa persono estas la juna Olaus Petri, filo de forĝisto el la urbo Örebro, kiu alportis al Svedujo la ideojn de la Luthera reformacio. La traktado de tiu reformacio tamen instigis lin al la enigo en la dramon de postuloj pri reformoj ankaŭ en la modernaj institucioj. *Gustaf Wasa* prezentas al la leganto bildon de sveda reĝo je la komenco de la deksepa jarcento. Dum

lia regado la Lutheran reformacion oni do enkondukis Svedujon. Alia fame konata dramo estas la tragedio *Fadern* (La patro), kiu enhavas multe da atakoj kontraŭ la virinaro. En *Svenska Öden och Äventyr* (Svedaj okazintaĵoj kaj aventuroj), kiu konsistas el aro da historiaj noveloj, Strindberg prezentas majstre verkitajn prikskribojn el la sveda historio. En ili oni bone vidas lian eminentan kapablon kiel rakontanto. Aliaj konataj, prose skribitaj verkoj estas ekz. la socia satiro *Röda rummet* (Ruĝa ĉambro), *Giftas* (Edziĝoj), kiuj pritraktas la edzecon, *Hemsöborna* (Loĝantoj de insulo) kaj *I havsbandet* (Sur la rodo), kiuj konigas al la legantoj la arĥipelagon de Stockholm, la membiografio *Tjänste skvinnans son* (Filo de servistino) kaj *Inferno*, kie li okupiĝas pri sia anima vivado. Dum pli posta parto de sia vivo li entuziasmiĝis je la studado de natursciencoj kaj mistikismo, kaj esprimo de tia intereso estas i. a. *Svarta fanor* (Nigraj standardoj).

La sekvanta novelo apartenas al *Svedaj okazintaĵoj kaj aventuroj*.

Borgholm, Svedujo, Aŭg. 1924

Oskar Frode.

INSULO DE FELIĈULOJ

La trimastulo „Sveda Leono“ jam suprentiris la blindvelon kaj la bonedvelon de la antaŭa masto antaŭ la fortikaĵo de Elvsborg, kaj oni ĝuste levis la ankron, kiam unu el la remboatoj de la dogano ekforlasis la bordon signalante, ke la ŝipego ankoraŭ ne devu forveturi; sed la vento jam ŝveligis la velojn, kaj la ŝipo streĉis la ankroŝnuregon. La doganistoj remis plejeble rapide; finon de ŝnurego oni eljetis, kaj baldaŭ la doganan boaton oni tiris apud la ŝipkorpon. El la boato suprenrampis du junuloj, kaj tra kanonpordo ili estis trenataj en la ŝipegon; post ilin oni ĵetis ledan sakon, kiu ŝajnis esti ilia sola pakaĵo. Tiam la doganboato ree forveturis, sed „Sveda Leono“, kiu jam surlevis la ankron sur la ankrotrabon, forveturis maren per malgrandaj antaŭveloj, dum salutpafadis la kanonoj de la dekstra flanko, al kio respondis la fortikaĵo.

„Sveda Leono“ enhavis ŝarĝon da forĝaĵoj, drapoj kaj diversaĵoj; krom tio 500 pasaĝerojn, plejparte krimulojn, alvenigitajn el ankroforĝejoj, malliberejoj kaj pundoj, kaj ĝi estis destinita al la kolonio Nova Svedujo en Nord-Ameriko.

Post kiam la du junuloj estis pene surrampintaj tra la subplanko kaj staris sur la ferdeko, ili sin turnis malantaŭen, kaj, kvazaŭ ekhavinte la saman penson, ili

eligis la langon, ĉu al la fortikaĵo aŭ al la lando entute, kiu bluate malaperis iom post iom, tion difini estus malfacile. Malŝarĝinte tiamaniere siajn patrolandajn sentojn, ili ekserĉis la kajuton de la ŝipestro en la postaĵo por montri siajn legitimaĵojn kaj doni deklaron.

El la raporto, kiun ili nun donis, oni eksciis, ke ili estas studentoj ĉe la universitato de Upsala, *Dominus Lasse Hulling* kaj *Peter Snagg*, ambaŭ plenpruvite kulpaj pri tio, ke en la restoracio de la urbo kaj ĉe drinkfesteno de samprovincaj studentoj ili estis parolintaj malhonore pri la reĝa profesoro *Serenissimus Olaus Rudbeckius* kaj lia ĵus eldonita centjarece kolosa verko *Atlantida* aŭ *Manhem*, en kiu la gloron de la patrujo altigis la aŭtoro tiom, kiom ĝis tiam oni ne pensis aŭ antaŭsentis, ĉar la nomita *Serenissimus* kun plena evidenteco estis pruvinta derive, ke Svedujo ne estis malpli ol la lulilo de la homaro. Pro ilia malsaĝa kaj malhonora dubo la plicitatajn Hulling kaj Snagg oni ĵetis en malliberejon, sed, ĉar ili kondukis maldece kaj puninde en ĉi tiu restadejo pli malvasta ol saniga, oni kondamnis ilin je „*gatlopp*“¹⁾ kaj pundo.

Ricevinte pardonon pro la speciala mildeco de lia reĝa moŝto, ili ekhavis la permeson, sin forsavi el la regno kaj forvojaĝi al Nova Svedujo per „*Sveda Leono*“.

La ŝipestro ricevis la deklaron kun forta rido. Li nenion aŭdis ĝis nun pri tiu libro „*Atlantida*“ sed sciiĝinte, ke ĝi pretendis pritrakti ion tian, ke Svedujo estas la subakviĝinta „*Atlantida*“ aŭ la Insulo de la Feliĉuloj, li tuj samopiniis kun la studentoj deklarante, ke ĉiu maristo scias, ke „*Atlantida*“ situas en la Granda Oceano, kiu ĝuste laŭ tiu sama insulo ricevis sian

1) T. e. kurado inter du vicoj da vergbatantoj.

nomon, t. e. Atlanta Oceano. Kaj tiam li bonvenigis la lertajn sinjorojn kaj fariĝis ilia bona amiko.

Favorata per bonaj ventoj la vojaĝo iris tra Norda Maro, la Angla Kanalo kaj oni eniris la Hispanan Maron. Ĉar pro eblo de averio oni ne riskis havi la mal-liberulojn alligataj, kaj aliparte oni ne timis forkuron aŭ ribelon, ĉar ĉiuj estis sin deklarantaj kontentaj je la foriro, ili povis sin movi libere, kaj ili kondutis bonege kaj bonmore. La edziĝintuloj rericevis siajn edzinojn kaj infanojn, kiujn ili ne vidis dum multaj jaroj. Ili estis treege feliĉaj, kaj la feliĉo igis ilin bonaj. Sed ili vere ne estis danĝeraj. Kelkaj el ili estis atakintaj per tranĉilo dum ebrieco, aliaj estis forkurintaj el la militista servo, aliaj estis ŝtelintaj fruktojn de najbaraj arboj, ĉar ili mem ne posedis arbojn. Ellasitaj el malhelaj, nesaniĝaj malliberejoj ili ĝuis senlime la perspektivon de la granda maro, kiu ĉirkaŭis ilin per lumo. Ĉio estis al ili nova, kaj ili ludis sur la ferdeko kvazaŭ infanoj. Jen ili volis rigardi delfenon dancantan sur la ondo, jen ili deziris rigardi la ŝipanojn kaptantajn ŝarkon aŭ flugfiŝon.

Ĉar ili estis liberigitaj el laboro, la tuta vojaĝo ŝajnis al ili kvazaŭ festotago, kaj sen iaj zorgoj pri la vivrimedoj ili altablĝadis por ricevi simplan sed sufiĉe nutran manĝaĵon.

La du studentoj, kiuj estis havintaj la ŝnuregon ĉirkaŭ la kolo, sed estis liberigitaj de tia puno, sin rigardis ĵamane kiel kunkrimulojn kaj konatiĝis kun la eksmal-liberuloj, kiuj devis rekomenci la batalon de la vivo en nova lando sub novaj kondiĉoj. Lasse estis pro naturo kaj edukado alveninta al la opiniaro, ke ĉiu okazintaĵo estas plej bona; Peter, male opiniadis, ke ĉio estas malbona. Kaj ofte la du kamaradoj malpacigis pri siaj opinioj pri la mondo, dum kio ofte okazis, ke unu

duono de la aŭskultantoj partianiĝis al Lasse kaj la alia al Peter. Kaŭze de tio la ŝipkuracisto unufoje forigis la disputon tiamaniere, ke li deklaris, ke ambaŭ partioj estas pravaj. „La vivo estas kaj nigra kaj blanka“, li diris. „Kiu okaze ekvidis nur la nigran flankon, kredas, ke ĉio estas nigra; kiu okaze ekvidis nur la blankan, tiu opinias, ke ĉio estas blanka.“ Kaj je tio ili kontentiĝis.

Tiamaniere ili alvenis al la naŭ insuloj de Azoroj. Ĉi tie ili ekhavis la permeson, iri surteren por tutetendi la krurojn. Ili opiniis esti alvenintaj al Paradizo, ĉar ĉi tie kreskadis vino, maizo, oranĝoj, ananasoj kaj melonoj sub libera ĉielo. Viro, kiu estis laboradinta dum ses jaroj en ankroforĝejo pro tio, ke li estis tranĉile pikinta alian viron, fariĝis tiom ĝoja, ke oni devis lin alligi, kaj alligita li kuŝis apud rivereto manĝante oranĝojn, tiel, ke li estis flava en la vizaĝo kaj krieganta, ke li estas Adamo. Pro tio li ankaŭ ekdeziris sin tute senvesti kaj sin vesti nur per tabakfolio, sed la ŝipopastro ekokupiĝinte pri li deklaris, ke estas peko promeni sen vestoj, sed la viro argumentis laŭ la Sankta Skribo kaj la sankta historio, ke post la unua peko Adamo estis vestita nur per figfolio, pro kio li opiniis havi la rajton sin vesti per tabakfolio. Sed tiam la pastro helpe de la patriarkoj kaj *Flora Exotica Sacra* evidentigis pruvis, ke figfolio ne estas tabakfolio.

Fine la pasaĝerojn oni kondukis surŝipen; oni ekveturis direktante la antaŭaĵon rektvoje al Antiguam. Ĝis tiam la vojaĝo estis kvietaj kaj bonega escepte ventegon travivitan en Norda Maro. Sed nun, kiam ili estis enirontaj la regionon de la senŝanĝa vento, ili ekhavis senventecon. La maro ilin ĉirkaŭis kiel hidrarga horizonto, sur kiu la ŝipo moviĝis kiel magneta vergeto.

La varmego fariĝis netolerebla; la gudro fluadis el la tuta senmova ŝnuregaro kaj el la kunigoj de la ŝipkorpo. Dum la tuta tago oni surŝprucis la ŝipon kvazaŭ timante, ke ĝi ekflamiĝos. Tiamaniere forpasis ok tagoj.

Tiam, frumatene, la observisto ĉe la antaŭa masto atentigis, ke norde nubo ekvidiĝas. La ŝipestro, sciante, kion signifas ĉi tio, tuj ŝnurfiksigas la pafilegojn kaj ĉion moveblan, ŝtopis la fendetojn inter lukoj kaj aperturoj kaj pretigis la homojn por la plej malbona okazontaĵo.

Post kelke da horoj, ĉe la matenmanĝo, nigra strio ekaperis ĉe la horizonto; kelke da horoj poste oni ekaŭdis bruegon kvazaŭ de ondegoj frapantaj marbordon aŭ kvazaŭ la bruo de veturiloj en urbo, kaj super la akvo alkuregis la ventego. Antaŭ ol la veloj estis sendanĝerigitaj la ŝipon, la ventego forblovis maren velostangojn kaj mastpintojn, kaj nur per subveloj „Sveda Leono“ estis forpelata suden, ĉiam antaŭen sen ia kono pri la celo.

La ventego furiozis dum tri tagoj, kaj ĉiumomente oni atendis ekaŭdi, ke la kilo ektuŝegas la fundon. La pastro legadis kaj preĝadis kaj deklaris, ke oni ne povas atendi ion alian, ĉar oni havas nur krimulojn surŝipe. Li memorigis pri Jonaso kaj proponis al la ŝipestro, ke laŭ la vortoj de la profeto Jona, ĉap. I, vers. 12 kaj sekvantaj, oni devas elĵeti de la ŝipo ĉiujn krimulojn por savi la justulojn, sed la ŝipestro malkonsilis. Kiam la danĝero estis plej granda, Lasse Hulling iris al la pastro kaj prezentis al li proponon, ke ĝenerala konfeso- kaj preĝotago estu tuj aranĝata, „ĉar“, li diris, „nur la nepentataj krimoj malaltigas la teleron de l' pesilo“. La proponon oni akceptis, kaj la konfeso, el kiu oni liberigis la krimulojn pro tio, ke ili ne havis nekonesitajn krimojn, komencis.

Ĉe farita ekzameno evidentigis, ke neniu justulo troviĝas surŝipe. Sed la ventego tamen daŭris. Tiam oni ekaŭdis mallaŭtan murmuron suprenleviĝantan el la kajutoj de la antaŭaĵo. Oni estis meditinta longtempe, kaj fine ruzulo ekpensis, ke ankaŭ la pastro devas konfesi, ĉar nur li estis nekonesinta siajn pekojn. La proponon oni akceptis aplaŭde, sed restis nun la demando pri konfesrenonto.

Peter Snagg sin fine anoncis, aludante sian ekzamenon pri la hebrea lingvo por la pastreco. La pastro vane protestis. Li estis alligata al la ĉefa masto, kaj, ricevinte malmildajn riproĉojn kaj afablajn admonojn, li konfesis dum abunda plorado, ke en sia juneco li malvirtigis konfirmotinion.

Nun oni faris interkonsiliĝon, je kiu partoprenis ankaŭ la pasaĝeroj, kaj ĉar la pastro jam estis voĉdoninta, ke oni eljetu ĉiujn krimulojn, kvincent personojn, maren, oni baldaŭ elparolis la verdikton, ke la pastro iru en la maron laŭ la vortoj de la profeto Miĥa, ĉap. XII, vers. 10 kaj sekvantaj. Kaj preĝinte lastfoje, li estis ĵetata maren.

Sed la ventego nur kreskis. Fine je la sepa tago dum la nokta mezgardado (aŭ: dum la dua noktgardado) la ŝipo alpuŝegis. Kriego respondis la bruegon de la ŝipkorpo, kies antaŭaĵo estis levita per alpuŝegita rifo, tiel, ke ĝi staris supren-malsupren. La kanonoj malligiĝis de la ŝnuregoj kaj trabatis la subplankon. Je la ektagiĝo la ŝipo komencis subakviĝi. Sed tiam kontraŭvente oni vidis teron.

La plejmulto jam eniris la boatojn, sed tempon ili ne havis por kunpreni eĉ peceton da provizaĵo, da vestoj aŭ eron da iloj. Kiam la suno levigis, ili estis sin savintaj ĉiuj, t. e. sescent homoj, kaj bonorde ili elboatiĝis, sed la ŝipo subakviĝis kiel ŝtono, kiam ili metis la piedon sur la teron.

II.

Post sep tagoj da penoj kaj sendormo la vojaĝantoj estis tiel lacegaj, ke ili tuj kuŝiĝis sur la tero por dormi sub la arboj, kreskantaj sur la bordo, sed Lasse Hulling kaj la ŝipestro foriris por esplori.

Ili neniam antaŭe vidis tiel strangan, belegan landon; jen ilia unua observo, post kiam ili estis devigitaj demeti siajn vestojn pro la varmego. Kio ilin mirigis antaŭ ĉio estis ektrovi je tiel norda latitudo — ĉar ili estis ankoraŭ tre norde de la ekvatoro — tiel varman, tropikan klimaton; sed ili baldaŭ ektrovis la kaŭzon en vulkano, kiu altiĝis malkrute kiel bastiono kontraŭ la norda vento kaj samtempe pro sia subtera varmeco aliigis la insulon en oranĝerion. Ĉie ili vidis palmojn kun daktiloj kaj kokosoj, artokarpojn, bananarbojn aŭ pizangojn, speĉon da oranĝarbo, ananasujojn, figujojn, gigantajn fragujojn, melonujojn, kiuj aŭ portas aŭ portos fruktojn. Ke la tero konsistigis insulon estis sendube. Riveretoj serpentumis sub la ombroplena arkaĵo de tamarindo, kaj en la ruĝa granito ili ektrovis fontojn kun glacie malvarma akvo, kio ilin mirigis, ĉar ili sciis, ke la tero estas vulkana.

Papagoj, kolibroj kaj tukanoj en ruĝaj, verdaj, bluj, flavaj kaj orkoloraj plumoj ĉirkaŭflugadis en la arboj kun dolĉa kantado — ne tia de la kriantaj ekzempleroj, kiujn ili jam vidis en kaĝoj — sed nur tiajn bestetojn ili ekvidis. Ilia ekskurso iris sub la ombro de la arboj, tra florantaj herbejoj, kiuj etendiĝis ĝis la marbordo. La varmo fariĝis ĉiam pli premanta, tiel, ke estis necese forlasi unu vestaĵon post la alia sur la tero. Ĉirkaŭ tagmezo ili surgrimpis la vulkanon, kiu ŝajnis estingiĝinta kaj ĉirkaŭ vespero ili povis ripozi por la nokto ĉe ĝia malsupro sub aparta palmfolio ne timante ata-

kojn de homoj nek de bestoj, ĉar ili estis nun konfirmintaj siajn supozojn, ke ili sin trovas sur insulo malhavanta ĉiajn danĝerajn bestojn aŭ homojn.

Reveninte la sekvantan tagon al la loko, kie ili iris surteren, ili ektrovis la kunvojaĝantojn etenditajn sub la arboj, sataj, duonnudaj kaj revantaj. Lasse, plej lerta kaj plej brava el ĉiuj, estis elektata prezidanto ĉe la kunsido nun farata. Oni tre certe trovis la insulon treege bonega, sed necese estis pensi pri la estonteco. La unua demando koncernis loĝejojn, ĉar oni atendis la vintron. Lasse tuj respondis al ĉi tiu demando per tio, ke laŭ ĉiuj kalkuladoj estas nun vintromezo. Tiuj, kiuj deziras loĝadi en mucidaj kabanoj, povas amuziĝi derompante arbojn kaj ilin senŝeligante per la ungoj, ĉar ĉiuj iloj forestis. Tiuj, kiuj preferas kvieton kaj ripozon, povas kontentiĝi je budoj sub la arboj. La dua timo koncernis manĝaĵon. Lasse asertis, ke laŭ liaj observadoj pri arboj kaj herboj, manĝaĵo ne mankos ĉi tie dum la tuta jaro, ĉar kiam unu arbo ĉesos doni fruktojn, alia rekomenciĝos. La tria kontraŭparolo venis flanke de la virinoj, kiuj timege antaŭvidis la tagon, kiam estos necese iradi sen vestoj. Lasse ilin atentigis pri tio, ke, ĉar jam meze de la vintro ili estas duone nudaj, ili, kiam venos la printempo, nepre devos vole nevole iri tute nudaj pro la varmego.

Post kiam ili estis do trankviligitaj pri la manko de manĝaĵoj, vestoj, loĝejoj, brulŝtofo kaj akvo, nur restis kontentiĝi je la cirkonstancoj. Kaj ili kontentiĝis. Sed unu konsilon Lasse donis al ili: ke ili ne restadu ĉiuj sur la sama loko, sed disiru ĉien sur la insulo. Kiam komuna afero estas priparolota, li ilin kunvenigos per korno, kiun li certe havigos al si. Kaj tiam ili disiris, sed nur post kiam Lasse-n oni elektis ĉefo, kaj li estis

faranta en tia kvalito paroladon, en kiu li ilin admonis al manĝado, trinkado kaj ĝojo, ĉar nun ili estas venintaj al unu el la insuloj de la feliĉuloj, pri tio ne estas dubo, kaj li nur deziras havi profesoron Rudbeckius ĉi tie apud si, tiam li certe igus lin formanĝi lian *Atlantika-n* kune kun ledaj kovriloj kaj ĉio.

Nokte ĉiu ekloĝis sub kelke da folioj alkroĉitaj al arbobranĉoj.

Sed la sekvantan matenon Lasse kunvenigis siajn plej proksimajn amikojn, t. e. la ŝipestro, Peter Snagg, kaj la kuracisto. Haviginte al si matenmanĝon post skuado de daktilarbo, Lasse atentigis pri certaj gravaj demandoj, al kiuj la estonteco respondos plej certe. La unuan demandon li adresis al la kuracisto: ĉu ili povos vivi sen viando kaj salo? La kuracisto opiniis, ke laŭ ĉio, kion li legis en libroj pri vojaĝoj, ili ĉe tiel varma klimato eĉ ne tolerus viandon, kaj koncerne la salon, la fruktoj enhavas tiom da saloj, ke ĝi ne estos plu necesa.

Dum tiu diskuto ili ekaŭdis krion el la plej proksimaj arbetoj. Viron oni alportis, palan kiel mortinto kaj kun evidentaj signoj de veneniĝo. Ĉe farita demandado montriĝis, ke, logita de dezirego je viando, li per ŝtono mortigis birdon, kiun li volis formanĝi, sed lin tuj ekatakis naŭzo kaj koliko. La kuracisto ordonis, ke li ne plu provu manĝi viandon, kaj tiamaniere la grava demando estis decidita.

La duan demandon prezentis Peter Snagg pri la enkonduko de publika diservo, popolregistrado kaj leĝaj aŭtoritatoj. Li konas la malicon de la homoj, kaj post kiam tia multo da sentaŭguloj restos dum kelke da tempo sen laboro, oni baldaŭ vidos, kiel ilia socio estos ĝenata de malpaco. Pro tio li proponis, ke la preĝeja

kompendio, de kiu li savis unu ekzempleron kune kun unu de la leĝaro, estu trastudata.

Lasse kontraŭdiris, ke nun, kiam ĉiuj kaŭzoj por malkonsentoj, nome manko de manĝaĵo, vestoj kaj loĝejoj estas forigitaj, ankaŭ la krimoj ĉesos. Kiu volos ŝteli, kiam li havos pli ol sufiĉe da manĝaĵo ĉiutage kaj ne bezonos iom kolekti? Kiu deziros mortigi, kiam kaŭzo por envio ne ekestos, ĉar ĉiuj estos same riĉaj kaj potencaj? Kiu volos enpenetri domon, kiam neniu domo troviĝos por ĝin perforte penetri? Kiu volos mortigi infaneton, kiam la infanoj havos pli ol sufiĉe da manĝaĵo kaj neniu bezonos timi trudi sin al la socio? Prove li volas preni la leĝaron kaj tralegi kelke da paragrafoj, la unue trovitajn.

Lasse, malferminte la leĝaron, legis:

„Unue: Kampara kodo. Tiun ni povas senriske malatenti, ĉar ni ne havas bienulojn. Ĉu vi tion aprobas?“

„Jes“, respondis la ĉeestantoj.

„Due: Leĝoj pri heredo! Kion heredi? Figfolion aŭ kokosan ŝelon? Estu forstrekote. Ĉu ne?“

„Jes“, devis respondi la ĉeestantaro.

„Trie: Konstruada kodo! Ĉap. 1. Kiamaniere difini vilaĝan teritorion kaj dividi kampojn. Ĉap. 2. Kiamaniere surkonstrui grundon! Ĉar nun tute ne estas konstruote aŭ dividote, ni forstreku ankaŭ ĉi tiun kodon, ĉu ne?“

„Jes“, respondis la ĉeestantaro.

„Kvare: Eklezia kodo! Ĉar ni ne havas preĝejon, ni devas forstreki ankaŭ ĝin.“

„Jes“, respondis la ĉeestantoj.

„Kvine: Kodo kriminala! Ĝi kompreneble forfalas sekve de tio, kion ni diris pri ŝtelado, pri rabo kaj mortigo, ĉar la kaŭzoj forfalas.“

„Jes“, respondis la ĉeestantoj.

„Sese: Edziĝa kodo! Ĉu vi volas prokrasti tiun demandon, ĝis kiam la estonteco donos al ni iom da sperto? La edzeco ja dependas de la tero, kaj ĉar terposedo ne ekzistas, ankaŭ edzeco ne ekzistas.“

„Jes“, respondis la ĉeestantoj.

Peter Snagg kontraŭdiris.

„Nun“, interrompis Lasse, „ni estas do forigintaj la tutan leĝaron, kaj nur la kovriroj restas! Tiujn Peter Snagg ricevos kiel memoraĵon, ĉu ne?“

„Jes“, ridis la ĉeestantoj, sed Peter ne kapitulacis. „Mi malkonsentas“, li diris. „Kiamaniere socio povos ekzisti sen leĝoj?“

„Aŭskultu, Peter“, respondis Lasse. „La leĝojn oni kreis por forigi la difektojn de la socio, socio malhavanta difektojn ne bezonas leĝojn! Ĉu mi estas prava?“

„Prava vi estas“, respondis la ĉeestantoj.

„Sed Peter Snagg“, rediris Lasse, „pli preferas difektan socion kun leĝoj ol perfektan sen leĝoj.“

Nun Peter ekparolis.

„Mi malatentas la demandon pri burĝa leĝo, pri ĝi estu laŭ via volo, sed socio sen religio ne povas ekzisti.“

„Bone“, diris Lasse, „pri tio vi estas prava! Religio estas necesa! Sed ni pripensu, ĉu la malnova religio taŭgos por niaj novaj kondiĉoj! Ĉu vi bonvolas min aŭskulti dum momento?“

„Jes“, respondis la ĉeestantoj.

„Nun mi komencas ĉe la komenco, diris Lasse, aŭ per la unua peko. Nudaj la homoj iris en Paradizo, sed ili ne laboradis. Bone! Tiam nepermesite ili ekmanĝis je la arbo de la konado kaj estis forpelataj ĉirkaŭ la teron por labori. Nu, ni retrovis Paradizon, sed Paradizon sen ia arbo de konado. Ni do ne povus peki,

eĉ se ni tion treege ekdezirus. Kaj eĉ farinte tion, oni nin ankaŭ ne povas forpeli, ĉar ni povus nenien ekiri, nek devigi labori, ĉar ni ne havas ilojn. Do, la unua peko ne valoras, kaj ĝin oni ne povas apliki al la nunaj kondiĉoj. Ĉu vi tion aprobas?“

„Jes“, respondis la ĉeestantoj gratante la kapon, sed la ŝipestro, demetinte la ĉemizon, iris al la bordo por bani.

„Do“, daŭris Lasse, „ĉar arbo de la konado ne ekzistas, peko ne ekzistas; ĉar peko ne ekzistas, repaciĝo ne estas necesa, kaj per tio la tuta dogmaro senvalorigas. Ĉu vi tion aprobas?“

„La pruvadon oni devas nepre aprobi“, diris Peter, „sed la naturdevena bezono de la homo pri religio ne estas tutdetruebla“.

„Mi tion aprobas“, respondis Lasse, „sed se estus naturdevene iri al preĝejoj kaj orgeni, tiu bezono devus ekzisti ĉe ĉiuj popoloj. Nu, ĝi ne ekzistas ĉe la sovaĝuloj, do ne estas naturdevene dormeti en preĝejoj, orgeni, alkroĉi himnociferojn kaj ricevi monkoklekton, sed tio estas akirita bezono. Bone! Kion oni akiris, oni ankaŭ povas perdi. Restas do ekvidi, ĉu ni ne perdos la bezonon ricevi insultaĵojn de drinkema pastro aŭ fordoni la lastan bovinon, kiam la pastro laŭtlegos preĝojn por mortinto ktp. — restas ekvidi, mi diras.“ —

La kuracisto sekvis la ekzemplon de la ŝipestro kaj foriris al la marbordo.

„Estas tro varmege por preparoli teologion“, li diris.

„Sed“, kontraŭdiris Peter Snagg, „la sakramentoj, la festotagoj, tiuj belegaj momentoj de feliĉega trankvileco!“

„La sakramentojn oni ne povas distribui, ĉar ni ne havas sankte ŝmiritan pastron.“

„Sed“, respondis Peter, „oni povus iun sanktigi.“

„Ne“, diris Lasse, „tiam episkopo ja estos necesa,

kaj ni ne havas episkopon. Cetere ni ne havas vinon, ĉar mi ne vidis vinarbobranĉon.“

„Koncerne tion lastan“, kontraŭdiris Peter, kiu estis jam malsekigita pro ŝvito, „la vinon oni povus anstataŭi per kokosa lakto, ananasa aŭ figa suko.“

„Neeble“, diris Lasse, „ĉar tiam estus necese falsi la tekston. Bone atentu: Jesuo diris al siaj disĉiploj: Mi estas la vinberujo kaj vi estas la branĉoj; li ne diris: Mi estas la kokosujo kaj vi estas la nuksoj, aŭ: mi estas la ananasujo kaj vi estas la dornoj, aŭ: mi estas la figujo, kaj vi estas la folioj. Do, se oni komencus falsi la tekston en unu loko, oni nepre falsu ĉion. Same ni ankaŭ ne havas panon. Tiam oni devus preni pizangon kaj ananason kaj ŝanĝi la formulon jene: Prenu kaj manĝu ĉi tiun pizangon.“

„Ne“, diris Peter, „nun komencas fariĝi tro varme. Nun mi iras min bani; ĉu vi kuniras?“

„All right“, diris Lasse, „ni forlasu la teologion!“

Kaj tiam ili iris sin bani.

III.

Unu jaro jam pasis. De ĉio, kion oni timis, nenio okazis. La vintro estis tiel varma kiel la somero. La sezonoj diferencis unu de la alia nur per la diferencaj produktoj, kiuj estiĝis, kaj laŭ la tempo de ilia maturiĝo. Lasse jam starigis almanakon. Per tio ĉiun tedan samecon de la manĝaĵo oni evitis, kaj oni fartis bonege. Do oni havis kvar sezonojn po tri monatoj: la Pizango, la Panfrukto, la Daktilo kaj la Kokoso. La Pizango aŭ Januaro—Marto maturigis ananasojn kaj oranĝojn; la Panfrukto, Aprilo—Junio, maturigis gigantajn fragojn kaj figojn; la Daktilo, Julio—Septembro, maturigis persikojn kaj ĉerizojn, la Kokoso, Oktobro—Decembro,



maturigis abrikotojn kaj morusojn. Krom tio oni senĉese alternis per melonoj, granatoj, maizo, pizoj, faboj, tiel ke la manĝaĵaro estis ĉiam nova kaj senlime ŝanĝebla. Ĉar neniu laboradis kaj la varmo estis granda, oni povis manĝi nur malmulte. Kaj ĉar la surŝipa nutraĵo ĉefe konsistis en salhava manĝaĵo, la fruktoj formis longdaŭran kuracadon kontraŭ la skorbuto, kaj pro ĉi tiu kuracado la manĝado de vegetaĵoj iom post iom fariĝis kutimo. Kelkaj sporadaj provoj manĝi viandon estis punataj per stomakaj doloroj. Maljuna drinkulo jam elpensis manieron aliigi per fermentado la kokosan sukcon en eabriigan trinkaĵon, sed li fariĝis tiel malsana, ke ĝin ripetis nek li nek iu ajn alia. Sekve de tiaj simplaj nutraĵoj la pasioj mildiĝis, kaj nur afablajn vortojn oni elparolis. Envio ne povis naskiĝi, ĉar ĉiuj havis la por la vivo necesan, kaj tumultoj ne okazis. Kolerego kaj malamo malaperis, kaj estis tro varme, diris la ŝipestro, por ke oni ekdeziru kvereli. Post kiam oni dekutimiĝis pri vestoj, kiuj ja dispeciĝis, oni kutimiĝis iri duonnude, kaj fine viroj kaj virinoj sin vestis nur per basko da dense plektitaj folioj. La infanoj iris tute nudaj.

Por pasigi la tempon oni elpensis ludojn, pilkludojn, ekskursojn, naĝadojn, boatveturadojn, kaj antaŭ ĉio la infanoj ekmontris grandan emon suprengrimpi la arbojn, ĉe kio ili baldaŭ akiris grandan lertecon. Krom tio Lasse fondis kvar grandajn festenojn: unu je la komenco de ĉiu sezono. Kaj kun senhipokrita ĝojo oni iris saluti ĉiun novan rikoltotempon, ĉar la ĝojo ricevi varion de la manĝaĵo estis sendube tre laŭnatura. Tiam oni kuniris por ludi tutan tagon. Viroj, virinoj kaj infanoj dancadis ĉirkaŭ granda brulejo de la ĵus rikoltitaj fruktoj, kaj la unue maturiĝintajn fruktojn oni oferis al la malavara Donacinto same kiel iam oferis Abel kaj Kain

al Dio, kaj tiun kutimon ĉiuj, eĉ Peter Snagg, opiniis tiel belega kiel laŭbiblia.

Peter Snagg jam provis estigi libereklezion kaj volis laŭtlegi predikon al ili, sed ĉio ŝajnis tiel gajige stranga, kaj kiam li preĝis por la estraro kaj la militistaro, tiu preĝo estis neniel aplikebla al la tieaj kondiĉoj. Kaj ĉe la konfeso neniu ajn provis esti sincera, ĉar neniu havis pekojn.

Konsento, paco kaj kvieto karakterizis la tutan socion; oni ĉesigis la uzadon de ĉiuj severaj vortoj, kaj fine oni alparolis unu la alian per karesaj nomoj. Kiam infano naskiĝis, oni eksentis grandan ĝojon, kaj ĝin oni akceptis en la socio dum ludoj kaj kantoj kiel donacon de la naturo, kies indecon ne estigis la bruta aparta konsidero pri la infano kiel kapitalo en la mano de la gepatroj, kaj ĝin oni ankaŭ ne rigardis kiel ŝarĝon aŭ punon. Kiam junulo kaj junulino ekdeziris naski infanon kune kaj fariĝi amikoj, ili tion sciigis al Lasse, kiu tuj solenis la ĝojan okazintaĵon per festeno, sed la du gejunulojn oni ne enregistrigis aŭ devigis fari promeson obei unu al la alia, tiel ke, se unu ekdeziris manĝi figojn kaj la alia pizangon, nenia leĝo povis ilin devigi manĝi la samon. Ĉar krom tio ĉambroj bonordigitaj ne ekzistis, nek vazoj lavpurigitaj, la edzino ne bezonis esti obeema al sia edzo, kaj „malkuniĝo laŭ lito kaj sidejo“ estis deviga, ĉar ekzistis nek lito nek sidejo, sed nur amaso da folioj sub arbo.

Do, ĉio estis plejeble senĝena, sendeviga kaj simpla, kaj la patrinaj ne bezonis kontroli siajn filinojn, ĉar ili ne bezonis timi, ke bofiloj edziĝu pro mono kun filino aŭ ke la filinoj nasku infanon nepermesite, ĉar estis konsiderate kiel granda beno naski infanojn kaj la staton, en kiu troviĝis junulino graveda, pro tio oni ankaŭ nomis „benata“.

Nur unu afero malhelpis la kvieton de ĉi tiu insulo de feliĉuloj; tio estis la memoro pri la pasinteco, kiu sin prezentis precipe dum la sonĝoj. Do, oni ofte aŭdis la dormantojn krii. Maljuna forĝisto ofte sonĝis pri la ankroforĝejo, eksentante la gardiston vekanta lin per piedbato en la flanko. Barelisto, kiu ŝtelis iam, ĉar li havis tro multe da infanoj, nokte sonĝis, ke la infanoj ploreante postulis panon, kaj vekigante kaj vidante la sunon lumigantan la ĉiam fruktodonantajn arbojn, li ekploris pro ĝojo kaj surgenuiĝinte li dankis al Dio pro ĉio bona; sed tiam la penso pri la estonteco ekokupis lin. Tiam helpis neniam konsoloj. Jen la demono de socio, alie tiel feliĉa: la penso pri la estonteco. Vidante, kiel feliĉaj ili estas nun, ili ne povis sen timo pripensi, kiel ili estos iam, se ekzemple ŝipo alvenos por ilin forpreni. Tamen neniu ajn el ili havis kaŭzon esti malsana pro nostalgio, ĉar malantaŭ ili troviĝis aŭ pundomo aŭ kazerna servo, kaj pri tio neniu sopiris. La memoro pri la pasinteco kaj la timo pri la estonteco estis do la fantomoj, kiuj ilian feliĉan kvieton malhelpis, kaj tiel la kuracisto kiel ankaŭ Lasse meditadis pri rimedo, sed senrezultate. Sed kion ili ne povis elpensi, la hazardo elpensis.

Iutage la forĝisto eniris la arbaron por sin refreŝigi post sendorma nokto. En rokŝirego li ektrovis arbuston portantan bluajn berojn, kiun li ne vidis antaŭe. Li ekprenis kelke da beroj en la manon kaj manĝis. Ili ne estis bongustaj, sed li ne atentis pri tio. Kaj tiam li iris hejmen, t. e. al la arbusto, kie li posedis sian folioamason por la nokto. Tie li renkontis sian edzinon. La forĝisto estis gajhumora, parolante sensencaĵon.

„Mi kredas, ke vi prenis guteton da drinkaĵo“, diris la edzino ankoraŭ memorante la pasintecon.

„Kion vi diras?“ demandis la forĝisto mirigite.

„Brando!“ diris la edzino ŝmacante kun la lango.

„Brando? Pri tio mi aŭdis neniam, kio estas ĝi“, diris la forĝisto mirigite.

„Se vi ne memoras, kio ĝi estas, vi certe memoras, ke vi restadis en la karcero de Karlskrona!“

„Karlskrona! Mi vin tute ne komprenas, edzino.“

„Tiaokaze vi perdis la memoron“, diris la edzino.

Kaj ĝuste tio fariĝis al la forĝisto, kaj per tio la eltrovaĵo estis farita. La kuracisto tuj kolektis la berojn kaj fordonis el ili al la tuta kunestantaro kiel rimedon kontraŭ sendormo, kiel li opiniis, kaj ĉiuj manĝis, ankaŭ la kuracisto, sed Lasse faligis la siajn teren, „ĉar“, li pensis, „oni ne scias, kion oni povas lerni el la pasinteco, kaj la estontecon neniu konas.“

IV.

Tri jaroj jam pasis post la elŝipiĝo, kiam Lasse forveturis iutage al la plej malproksima parto de la insulo por ekzameni ankoraŭfoje ĝiajn rimedojn por la estonteco kaj eltrovi, ĉu ĝi povas elporti la fortan pligrandiĝon de la popolo, konstateblan dum la lastaj du jaroj. Li prenis malgrandan kanoton, en kiu padelante li kontraŭfluenveturis la rivereton sub la densa foliaĵo de la bananujoj kaj jam enpenetris la insulon kelke da mejloj. Laca pro la remado li elboatiĝis kaj, matenmanĝinte sub ĉerizujo, li kuŝiĝis por dormeti.

Li verŝajne ne estis fermanta la okulojn multajn minutojn, kiam li vekigis pro brukrakado supre en la bananujo, sub kies branĉoj li kuŝiĝis. Li sekrete rigardis supren inter la folioj kaj tuj ĉe la supro li opiniis ekvidi simion, kiu sidis sur branĉo forigante per longaj ungoj kernojn el la grajnujoj de la bananujo,

kiujn li poste enŝovis en la buŝon, superkreskitan per longa barbo. Lasse maltrankviliĝis, ĉar tio estis neatendita konkuranto, kiu — ĉar ĝin akompanis verŝajne aliaj — faros al la ŝiprompiĝintuloj grandan malhelpon. Li decidis logi la simion al si por ĝin aŭ kapti aŭ mortigi per ŝtono. Li foriris serĉante melonon de plej granda, plej flavruĝa speco, kaj kun ĝi en unu mano kaj ŝtono en la alia li alproksimiĝis al la arbo, kie sidis la simio.

Unue li komencis ŝmaci per la lango: la simio ekaŭskultis kaj ĵetis bananon sur la kapon de Lasse.

„Koko“, daŭrigis Lasse, montrante la melonon. Sed la simio, anstataŭ respondi suprenrampis ĝis la supro de la arbo, kiu kurbiĝis pro la ŝarĝo kiel pafarko.

„Koko, mia knabo“, allogante diris Lasse, „venu ĉi tien, kaj vi ricevos ion bongustan.“

Tamen Koko ne venis, sed piedobatis kaj kondukis treege maldece, tiel ke Lasse, kiu ne havis tempon foriri, eksplodante pro kolero, ekkriis: „Mil diabloj! mil diabloj!“

Je tiuj vortoj Koko ŝajne treege emociita eksidiĝis sur branĉon. Ĝi skrapis la nazon kontraŭ la ŝelo de la arbo, kaj la larmoj ruliĝis kiel puloj malsupren de ĝia barbo. Lasse ĝin aŭdis ĝemadi, sed li ankoraŭ restadis sufiĉe malproksime.

„Nu, malbenata diablo, ĉu vi ne volas malsupreniri, malbenata diablo, por gustumi mian melonon?“

La emocio de la simio ŝajnis pligrandiĝi, kaj tiu de Lasse fariĝis ne malpli profunda, kiam li ekaŭdis homan voĉon de supre de la bananujo.

„Patrolandaj tonoj, patrujo kaj amiko; miaj okuloj ploras pro via posteularo; neniam antaŭe la norda lingvo sonoris tiel dolĉe al miaj oreloj, kaj mia koro estas plena kiel vazo, kiel kalabaso, kiam la suno de la post-somero ĝin plenigas je lakto kaj kerno.“

„Mil diabloj! mi kredas, ke estas pastro Axonius“, ekkriis Lasse. Kaj kun unu: „prava vi estas“, la pastro malsuprensaltis, kaj daŭre ĉirkaŭprenante unu la alian la du samlandanoj alpremiĝis unu al la harhava brusto de la alia, sin banante en la larmoj de la pastro.

„Kiamaniere vi do alvenis ĉi tien?“ estas la unua demando de Lasse. „Ni vin ĵetis maren, ĉu ne? Ĉu iu baleno englutis vin por vin poste elvomi sur la teron?“

„Mi ne estas elvomita sur la teron“, diris la pastro, „mi naĝis alborden“.

„Rakontu, rakontu“, diris Lasse.

La pastro forviŝis siajn larmojn per pizangfolio kaj sidigis sur ŝtonon. Poste li komencis la rakontadon.

„Kvazaŭ songe travivinte tion mi nun memoras, ĉar ci — mi diras ‚ci‘, ĉar ni nin renkontis tiamaniere — ĉar ci min memorigas pri tio, ke oni min elĵetis en la maron, sed la kaŭzon mi ne memoras.“

„Ho, ĝi verŝajne estis sufiĉa, *ratio sufficiens*, kiel diras Aristoteles.“

„Kiu estas Aristoteles? demandis la pastro.“

„Ho, pensis Lasse, li ankaŭ jam manĝis el la beroj! Nu, daŭrigu sen iu zorgo pri Aristoteles“, diris Lasse.

La rakonto de la pastro:

Post kiam mi jam ĉirkaŭnaĝis dum malcerta tempo, mi memoras, ke mi eksentis la fundon sub miaj piedoj, post kio mi albordiĝis insulon similan al tiu. Post kiam mi manĝis berojn kaj trinkis akvon, mi kuŝiĝis por dormi. Vekigante mi eksentis strangan kvieton kaj trankvilon, kiujn mi antaŭe ne spertis. La naturo ŝajnis al mi malfermita libro, kaj la interrilato inter la kreitaĵaro kaj la kreinto ŝajnis al mi tiel simpla. Mi sentis, ke ia malhela pasinteco troviĝis malantaŭ mi, sed mi ne sciis kio ĝi estas. Mia

kapo estis malpeza, kaj neniam prizorgoj okupis min. Bonhumora kiel neniam antaŭe, mi piediris internen de la insulo. Mi ne estis irinta longan pecon da vojo, kiam mi ekvidis viron kuŝantan antaŭ idolo, kiun li adoris. Ho, mi pensis, mi alvenis al idolista lando, ĉar miaj pensoj ŝajnis ankoraŭ esti kunmiksitaĵoj per malnovaj, neklaraj perceptoj. Duonfreneziga pro kolero vidante tian malnoblecon de la animo, kiu povis humiliĝi al figuro farita de homaj manoj, mi ekprenis ŝtonon kaj renversis la idolon. Tiam ĉi estus devinta ĉeesti! La viro kriegis kaj disŝiris sian hararon nomante min idolisto. Post kiam li trankviliĝis, mi demandis, kian religion li konfesas. Li respondis, ke li konfesas la mildan „nicæan“ dogmaron. Ĉar mi ĝin ne konis, li devis ĝin klarigi al mi. Ĝi estis la plej malsaĝa dogmaro pri kiu mi aŭdis. Oni ĝin do akceptis iam nur pro plimulto de kvar voĉoj ĉe la kunsido de Nicæa. Mi petis deklaron pri la dio, kiun ili adoras kaj pri la demando, ĉu ekzistas pli ol unu dio! Ne! li respondis; ili adoras la solan veran dion! Bone, mi respondis, tiam ni adoras la saman dion. Sed kiel do koncernis lin idolo alkroĉita al pendigilo? Jes, ĝi estas la filo de Dio! Estas ne-taŭga Dio, mi opiniis, kies filo toleris, ke oni lin pendigas. Tiam li respondis, ke mi tion ne komprenas. Mi tion volonte konsentis, sed li esprimis la esperon, ke verŝajne ĉio fariĝos pli bona, kiam la sankta spirito venkos mian koron. La sankta spirito; vi do havas tri diojn? Li respondis, ke min gvidas ankoraŭ la diablo, sed kiam mi estos liberigita de liaj ungegoj, fariĝos pli bone! Ho, vi havas kvar diojn? Kaj se min gvidas la diablo, la princo de l' mondo, mi petas la permeson sekvi lin. Se tiu, kiu min gvidas, estus kreinta la belan teron kune kun ĉiuj ĝiaj belegajoj, kaj se li estus la

princo de l' mondo, mi lin konfesus. Kaj mi surgenu-
iĝis adorante la mondprincon. Sed tiam la viro ek-
kriegis kaj alvokis grandan aron da siaj samideanoj.
Ili kunligis al mi manojn kaj piedojn. Post tio ili min
kondukis al malgranda, stranga domo kun pendigilo sur
la tegmento. — Kiu loĝas ĉi tie? mi demandis. — Ĉi
tie Dio loĝas, ĉar jen la domo de Dio, respondis unu
el la nigruloj, ĉar ĉiuj estis nigre vestitaj. Ho, Dio
mia, princo de l' mondo, mi ekkriis, batu ilian imper-
tinentecon per via fulmo! Vi, kiu loĝas super la ĉieloj
kaj havas la sunon, la lunon kaj la stelojn kiel vian
subpiedan benketon, ĉu vi loĝus en ĉi tiu domaĉo! —
Nun la plej maljuna el la nigruloj alpaŝis al mi dezir-
ante afable interparoli kun mi. Li diris, ke la dogmaro
de Nicæa estas la dogmaro de la mildeco kaj pro tio
li volas min konvinki per mildo. Li demandis min, ĉu
mi volas ami hebreon, kiu suferis kaj mortis pro tiu
dogmaro. Tion mi neis, ĉar unue mi ne konis hebreon,
kaj due mi volis ami neniun ol Dion. Tiam li ekkoleris
dirante, ke mi iros al Infero. Ĉar mi opiniis, ke, laŭ
lia milda dogmaro, la infero devas esti bona loko, mi
respondis: kun plezuro! — Vere, li ekkriis. — Tiam
ili kondukis min en la domon de Dio! Ĉe la pordo
staris viro kun ŝparmonujo petante monon. Mi de-
mandis, ĉu li montras sian dion kontraŭ mono? Tiam
alvenis servisto, kiu ekbatis al mi la kapon per bastono.
Mi petis lin esti milda al mi, ĉar mi ja sciigis pri la
dogmaro de la mildeco. Post tio ili min kondukis antaŭ
grandan pentraĵon. Ĝi reprezentis la inferon. Plej
supre vidiĝis maljuna, malafabla viro kun longa barbo,
super li kolombo kaj ĉe liaj piedoj ŝafido; ĉirkaŭe granda
aro da aliaj idoloj kun flugiloj kaj sub ili la infero. Ĝi
tute ne aspektis alloganta. Aro da nigraj idoloj kun

preniloj pinĉis virojn, virinojn kaj infanojn ĉe la plej doloraj lokoj kaj ĵetis ilin poste en fajron. — Estas abomeninde, mi diris, kaj min ekkaptis blinda fervoro konverti ĉiujn tiujn malfeliĉulojn de ilia idolkulto. — Ĉu tio estas la milda dogmaro de Nicæa? mi demandis; kaj se la infero estas tia, mi ne volas esti Nicæano! — Kaj tiam mi surgenuiĝis preĝante por ili: Ho, Dio, kreinto kaj konservanto de l' mondo, enrigardu la korojn de ĉi tiuj malfeliĉuloj kaj mildigu iliajn nehumanajn, erarigitajn animojn. — — — Sed pli longe mi tute ne povis paroli antaŭ ol oni min renversis kaj portis eksteren.

La sekvantan tagon oni intencis bruligi min vivantan, ĉar mi ne volas kredi la dogmaron de Nicæa. Mi ĝentile demandis la plej maljunan, ĉu ilia milda dogmaro ne havas iom pli mildan punon por krimo kiel la mia. Oni tion neis. Jen la brulejo pretigita kaj vestita per kostumo kun hontindaj bildoj de la princo de l' mondo kun kornhava kapo kaj eligita lango — pensu do, kiaj blasfemantoj — ili min kondukis supren sur la lignaron. Kantante himnojn kaj tenante idolajn bildojn antaŭ mi, ili min preparis por morto. Mi neniam kredis, ke tiom sovaĝaj homoj troviĝas sur la insuloj de la maro. Nu, la momento alvenis, kaj mi kredis, ke ĉio estas finita.

Tiam la ĉielo kovriĝis per nuboj, kaj elirante el la nuboj fulmo, eĉ fulmoj, ekbatis la didomon kaj la idolajn bildojn. — Jen, vidu, mi ekkriis, Dio renversas sian propran domon! Ĉu vi kredas ankoraŭ, ke li loĝas en ĝi? — La nigruloj disiris, mi min forŝiris. Preninte boaton ĉe la bordo, mi ekvojaĝis sur la maron, ĉar pli preferinde ja estis perei per la mano de Dio ol per tiu de ĉi tiuj idolanoj. Nun mi estas ĉi tie, kaj mi nun intencas instigi vin al foriro kun mi, por konverti ĉi tiujn idolanojn al la sola vera dogmaro. —

Lasse atente aŭskultis la strangan rakonton de la pastro, sed je la fino li pli atente turnis sian rigardon al la vulkano, kiu, malproksime de tie, suprensendis maldensan fum nubon.

„Ni unue hejmeniru por preparoli la aferon kun niaj amikoj“, li diris, „antaŭ ol foriri por komenci nian konvertigan agitadon.“

Ili enboatigis kaj hejmenremis dum instruoplenaj interparoladoj pri diversspecaj idolanoj kaj la deveno de la homaj herezoj. Kiam ili revenis hejmen, la ĉielo jam estis senlumigita de fumo, kaj malfortaj bruoj aŭdiĝis el malproksime. Timo superregis ĉiujn, kaj oni ne sciis, kio okazos. La reveno de la pastro ne kaŭzis multan sensacion, ĉar aliaj aferoj postulis pli da pripensado. La tutan nokton oni maldormis preparante la boatojn, kiujn oni prudente ankoraŭ konservadis kaj tenadis bonordaj. — La ĉielo estis ruĝa kiel fajro, kaj tiuj, kiuj suprengrimpadis la arbojn por kolekti manĝan provizon, povis vidi, kion ili faras, ĉe la brilo de la vulkano. La tutan sekvantan tagon oni daŭrigis la plenigadon de la boatoj je akvo, fruktoj kaj folioj, ĉar nun verŝajne ilin atentos malsato kaj malvarmo. La bruego kreskis kaj la tero ŝanceliĝis. Je la tria tago oni ekaŭdis tondrokrakojn kaj el la vulkano elfluegis kvazaŭ akvofalo da fandiĝanta brulruĝa lafo.

Nun ĉiuj kuregis en la boatojn kaj dum doloro, plorado kaj ekĝemoj oni forveturis de la Insulo de Feliĉuloj, kie la ĉiondonanta naturo ilin nutris kaj vestis dum tri jaroj, kie ili vivis trankvile kaj feliĉe sen malpaco aŭ fervoro, kaj kiun ili devis nun forlasi por renkonti nekonatajn sortojn.

Kiam ili jam atingis la de la bordo malproksiman maron, la insulo komencis subakviĝi. La arboj malsupreniris sub

la akvon, kaj la pintoj balanciĝis pro la ondoj. La iom malaltaj montetoj malleviĝis iom post iom; fine ankaŭ la keglo de la vulkano komencis esti atingebla al la bolŝaŭmado de la ondegoj. Ĉiu ondego, enfalinte en la krateron, estis suprenŝprucigata kiel vapornubo, ruĝkolora pro la ardanta lafo, blukolora pro la brulanta sulfuro kaj verda pro kupro kaj aliaj metaloj fandataj mal-supre en la grandega forno.

Kaj tiamaniere la Insulo de Feliĉuloj malaperis antaŭ la vido de la malfeliĉuloj, kiuj sin nun fordonis al ventoj kaj ondoj por renkonti la morton aŭ eble ion pli mal-bonan.

V.

Ekvidante fine teron post kvintaga ĉirkaŭremado sur la maro, niaj vojaĝantoj preskaŭ estis tute elĉerpitaj pro malvarmo. La nova lando, aperante nun al iliaj okuloj, ŝajnis esti kontinento aŭ almenaŭ treege granda insulo. Post kiam ili estis albordiĝantaj, ilia manĝopro-vizo estis konsumita, kaj ili sin ĵetis avide sur multegon da mituloj, kiuj troviĝis sur la bordo, kaj pro tiu oleaca nutraĵo ili reakiris iom post iom la korpvarmon. La lando ŝajnis havi pli malvarman klimaton, kaj el la belegaj fruktarboj de la Insulo de Feliĉuloj oni eĉ postsignon ne povis eltrovi. La arbaro konsistis el fagoj, kverkoj, betuloj kaj pli supre sur la montoj el pinoj kaj abioj. Malsataj, kiel ili estis, ili provis manĝi la glanojn de la fago kaj de la kverko, sed ili ne satigis kaj krom tio ili havis guston malplaĉegan. Sed inter la arboj kuradis leporoj, kaprioloj, sovaĝaj kaproj kaj ŝafoj, kaj el la arbustoj aŭdiĝis urogaloj kaj tetroj. Ili do tuj komprenis, ke ĉi tie estas necese vivi de ĉasado kaj fiŝkaptado, kaj ke estas urĝe havigi al si plejeble rapide varmajn vestojn el la feloj de la bestoj, se oni ne volas morti pro malvarmo.

Lasse tuj anoncis grandan kunsidon kaj proponis la jenan programon:

La unuan tagon ĉiu rajtas promeni ĉe la bordo por nutri sin per mituloj kaj serĉi grotojn kaj kavernajn arbojn por la nokto. Sed tiuj, kiuj trovis groton aŭ kavajon, tuj poste alportu mitulojn kaj akvon al kelkaj el ili, kiuj fabriku pafarkojn por pafmortigi la bestojn, ĉar ilia laboro ilin tute absorbos. Kiel preparan laboron por la arkfabrikado li dekretis la serĉadon de tranĉaj ŝtonoj, kiuj devas servi kiel tranĉiloj.

Kiam alvenis la nokto, oni ankoraŭ estis kolektinta nur kelke da tranĉaj ŝtonoj, kaj oni kaŭriĝis por dormi en kavajoj, grotoj kaj sub la renversitaj boatoj. La sekvantan matenon la laboro pri pafarkoj rekomencis, post kiam kelkaj tamen jam estis provintaj mortigi per ŝtonoj kelke da bestoj, kies felojn oni tuj forigis kaj uzis kiel vestojn por la neplenaĝaj infanoj. Tamen, kiam la trian tagon nombro da pafarkoj estis pretaj, la viroj foriris por ĉasi, kaj ankaŭ tiuj virinoj, kiuj ne estis gravedaj nek havis prizorgotajn infanojn. Estis ĝuste je la kriza momento de bezono, ĉar ĉiujn mitulojn, kiujn la lasta ventego ĵetis alborde, oni jam formanĝis. La ĉasakiraĵo ne estis granda. La pastro kaj la forĝisto, kiuj okaze pafcelis al la sama leporo, ekkomencis disputon por scii, kiu ĝin mortigis, kaj ili certe estus interbatintaj, se Lasse ne estus interveninta, difinante la aferon tiamaniere, ke ili devas dividi la akiraĵon.

„Nun la interbatigo komencas“, diris Lasse al si mem, kaj la sceno malgaje impresis la ĉeestantojn.

Estis necese manĝi la bestojn krudaj (nekuiritaj), kio estis malplaĉega. Sed ĉe la manĝo, kiun oni nun aranĝis, ĉiuj gravedaj virinoj kaj tiuj virinoj, kiuj devis resti hejme pro la infanoj, alvenis postulante, ke oni donu ankaŭ al ili iom el la manĝaĵo. Sed neniu volis dividi

la manĝaĵon kun ili. Tiam Lasse denove devis interveni, kaj li postulis de ĉiu viro, kiu estis patro de naskitaj aŭ ankoraŭ nenaskitaj infanoj, ke ili dividu sian akiraĵon kun la virinoj. Sed tute neeble estis ek trovi la patrojn, ĉar dum la tri jaroj sur la Insulo de Feliĉuloj viroj kaj virinoj intermiksiĝadis ne kontrolante la patrecon. Disputo komenciĝis. Lasse denove devis interveni. Dividinte la virojn kaj la virinojn en du amasojn, li petis ĉiun virinon elekti viron. Post tio ĉiu virino devis solene promesi interrilati kun neniu alia viro, tiel longe dum la viro havigos al ŝi kaj ŝiaj infanoj manĝaĵon kaj vestojn. Tion ili ĉiuj opiniis tre justa. Sed Peter Snagg, kiu ja estis ĉiam kontraŭema, ekdemandis, kion faros viro, se la virino estos malfidela al li. Al tio respondis Lasse, ke tiaokaze ĉesos lia devo zorgi pri ŝi, t. e. li rajtos foriri de ŝi aŭ forpeli ŝin, ĉar la naturo ne volas, ke unu pagu per sia laboro la plezurojn de la alia.

„Kaj tiamaniere ni ree sankciis la edzecon“, pensis Lasse al si mem.

Ĉiuj duonkreskuloj rajtis fari al si fiŝhokojn el la ostoj de la bestoj kaj kun torditaj herboj kiel hokfadenoj ili povis komenci la kaptadon de malgrandaj fiŝoj.

Do la juna socio travivis dum kelka tempo sufiĉe penigan vivon. La vintro estis severa en la grotoj, ĉar oni ankoraŭ ne havis fajron.

Kiam alvenis la printempo, oni ekvidis kun teruro, ke la ĉasaĵo komencis malpliigi. La ekskursoj fariĝis ĉiam pli longaj, pli funden de la arbaroj, sed anstataŭe estis necese dormi for de la hejmo kaj malfacile estis treni la akiraĵon hejmen. La disputoj pri la akiraĵo komencis fariĝi pli oftaj, kaj la paco estis maltrankviligata. Tiam ĝustatempe, kiam al la socio minacis ruiniĝo,

pastro Axonius iutage eniris la hejman vilaĝon kun la tiel longe kaj tiel senpacience sopirita fajroŝtono. Peco da pirito ĝi estis. Sed li envie gardis la eltrovaĵon. Kaj Lasse, kiu sole ankoraŭ posedis la rememoron, starigis kompanion kun Axonius por ekspluati la trezoron. Ili jam delonge vidis la malkontentecon de la popolo; ili ekvidis, kiel iom da malinklineco naskiĝis kontraŭ la peniga ĉaso kaj kiel ĉiuj sopire memoris pri la feliĉaj tagoj, kiam neniu bezonis labori. La ekscitiĝo estis ĝenerala, kaj la emo eviti la laboron trapenetris la tutan socion kiel peko. Lasse kaj Axonius, kiuj devis senĉese elpensi plibonigojn ĉe la fabrikado de pafarkoj kaj de vestoj kaj pri la forigo de disputoj, ne havis multe da tempo por la ĉaso. Pro tio ili devis humile peti sian manĝaĵon de la aliaj, kiuj nur malinkline fordonis el la sia. Jen momento, kiam ili ne plu bezonos humile peti, kiam ili pro granda servo farita de ili al la socio povos postuli, pro dankservo esti nutrataj kaj vestataj. La vintro alproksimiĝis, kaj la bezono de fajro estis pli sentebla ol iam antaŭe.

Lasse do kunvenigis la popolon. Tiam li prezentis al ili la necesecon foriri ĉiuflanken por serĉi novajn ĉas-ejojn. Tion tamen ebligos nur la kunportado de loĝejoj, ĉar necerte estas trovi groton ĉiuvespere. Tial, se estus eble, loĝi en transporteblaj tendoj, la demando estos solvita. Sed por povi loĝadi en tendoj, necesa estos la fajro. Kiu povas ĉiumomente havigi fajron, estos la plej eminenta viro de la nova tempo. Pastro Axonius ricevis de la naturdioj pli grandan konon pri la sekretoj de la naturo ol ĉiu ajn alia, kaj uzante la konon de la pastro, Lasse eltrovis kune kun li manieron havigi fajron. Nun li demandis la socianojn, ĉu ili volas nutri lin kaj la pastron kontraŭ la ricevo de fajroŝtonoj.

La ĉeestantoj respondis per sonanta „jes!“

Post tio Lasse pretigis ŝtiparon. Ĵetinte mustelfelon sur la kapon de la pastro kaj vulpfelon sur liajn ŝultrojn, li murmuris, dum kiam li rigardis la sunon, kiun li salutis kiel la fonton de la fajro, kelkajn hebreaĵajn vortojn, kiujn respondis la pastro per kelkaj nekompreneblaj. Post tio li ordonis al la popolo surgenuiĝi. Tiam la pastro ekbruligis, kaj baldaŭ la ŝtiparon ĉirkaŭis flamoj.

„Nun“, diris Lasse laŭvoĉe, „nova tempokalkulo komenciĝis. Kun la fajro ni povas ĉirkaŭmigradi la landon, kaj la akiraĵoj de la ĉaso mankos neniam. Feliĉon, hokus, pokus, baraŝit, baraj, Mahomet!“

Kaj la tuta popolo dancis kiel ebriuloj ĉirkaŭ la bel-ega fajro.

Ricevinte de ĉiuj la promeson, ke je certaj tempoj ili alportos tributon, li distribuis fajroŝtonojn kaj ordonis al la popolo tuj fari al si tendojn, sin aranĝi en kvin amasoj kaj foriri. Kiam ili denove bezonos fajron, ili revenu.

Post sep tagoj ili finpretigis la tendojn, kaj tiam ili foriris en la arbarojn, sed nur post la ordono ke, ekster la tempo, kiam ili alportos la fajrotributon, ili kunvenu plejeble multope certan tagon ĉiujare ĉirkaŭ mezvintro, kiam la tagoj denove komencas plilongiĝi, por soleni per grandega fajro la revenon de la suno kaj la eltrovon de la fajro. Krom tio Lasse deklaris, ke pro sia intima interrilato kun la dioj, pastro Axonius ne povas plu havi la honoron ilin vidi tiel ofte kiel antaŭe; ĉi tiu ankaŭ anoncis per Lasse, ke li ne plu aprobas la nomon Axonius, sed deziras, ke oni lin nomu tute simple Uffka, vorto de profunda signifo, pri kies propra senco Lasse ankoraŭ tute ne estis certa, ĉar ĝi estas

tiel profunda, ke estas necesaj ses generacioj por ĝin funde esplori. Kaj tiam ili foriris.

Sed Lasse kaj Axonius aŭ Uffka, kiel oni lin nomis depost tiu tempo, kiuj ne bezonis ĉasi, sidadis hejme ĉe fajroj frandante. Ĉar ili havis pli da manĝaĵo ol ili povis formanĝi, ili baldaŭ subaĉetis kelkajn virojn kaj virinojn, kiuj ankaŭ malinklinis ĉirkaŭvagadi la arbarojn, por ke ĉi tiuj prizorgu ilian fajron, rostadu ilian manĝaĵon kaj kudru iliajn vestojn.

„Nu ni ankaŭ havas sinjorojn kaj servistojn“, diris Lasse al si mem; restas vidi kiamaniere finos ĉi tio.

VI.

La tempo forpasis malrapide, kaj Lasse sidadis kviete, ricevante sian tributon. Sed la sekvantan jaron post la granda oferdono li vane atendadis kaj la malsatego estis proksima. Tiam li forsendis Uffka-n vestitan per longa redingoto farita el korpoplumoj, por ke li spionu kaj timigante devigu la ribelemulojn al la pago de la tributo. Kiam Uffka revenis, li estis disŝirita kaj malbone traktita. La popolo ne plu kredis je li, kaj ili ne plu bezonis la fajroŝtonojn de Lasse, post kiam Peter Snagg eksciis, kie ili troviĝas. Sed Lasse ion alian preparis, ĉar li estis saĝa viro, kaj li ankoraŭ posedis la memoron. Kunvenigi la gentojn nun estis senutile, sed li forveturis por serĉi Peter Snagg kaj lian genton, ĉar li intencis lin venki sur lia propra teritorio kaj en la ĉeesto de atestantoj. Kiam post peniga taga vojaĝo li fine alvenis al la tendaro de Snagg, li alpaŝis al Peter respekte salutante, kaj post atingita privata interparolado ili ekstarigis kompanion por nova eltrovaĵo. La genton oni kunvokis, kaj Snagg faris la sekvantan paroladon:

„La ĉasista vivado neniel malhavas penojn kaj maloportunaĵojn. Kelkafoje ni havas superfluan da viando, tiel ke ĝi forputriĝas, kelkafoje mankon. Certe malgrandajn provojn oni faris por konservi la superfluan per sekigo, sed difektaj metodoj trompis niajn esperojn. Nun tamen mi kaj Lasse Hulling eltrovis sekretan ŝtonon, kiu ebligas la konservadon de viando, fiŝo kaj feloj kontraŭ forputriĝo. La konsekvencoj de tiu plej granda eltrovaĵo de la nuna tempo estas nekalkuleblaj. Nun ni povas ĉasi dum certaj tempoj kaj poste sidi kviete, kaj la kvieta sidado tamen estas la plej granda, plej pura kaj plej certa ĝuo. Se vi nun interkonsentas, doni tributon al Lasse kaj mi, vi ricevos nian eltrovaĵon.“

Sonanta „jes“ estis la respondo.

Peter tuj poste distribuis blankan pistitan ŝtonon, kiu nomiĝis salo, kaj ordonis al la homoj reveni ĉiusemajne, por preni ilian provizon kontraŭ transdono de tributo. Kaj tiam Lasse rehejmeniĝis.

Sed la tributo ne fariĝis tre ampleksa, ĉar ŝipestro Barbo jam enkondukis ĉe sia gento la metodon fumaĵi la viandon, kio faris lin tributprenanto kaj la Barboj ne deziris salon.

Post la enkonduko de la salo oni komencis ekhavi pli da tempo por kvieta hejmsidado. Sed nun oni estis tiom kutimiĝinta al peniga okupado, ke oni havis okazon elpensi novajn inventaĵojn. Do, ekzemple la kuracisto, kiu estis tributprenanto de gento, eltrovis ruĝan metalon facile frapeblan, kiun oni prefere uzis por la sagoj. La metalo estis nenio ol kupro, kaj depost ĝia enkonduko la ĉasado fariĝis multe pli facila, krom tio oni fabrikadis al si tranĉilojn kaj hakilojn, per kiuj oni dehakis la arbojn. Sed nun komenciĝis serĉado de kupro ĉie. Ĝi ne estis trovebla. La aliaj gentoj sendis kurieron

al doktoro Pikilo petante, ke li sciigu al ili la kuprolokon. Li rifuzis komuniki al ili la sekreton. Dume li vendadis tranĉilojn kaj sagopintojn kontraŭ salo kaj fajroŝtonoj, kiuj mankis al li, sed li tenis la prezon tiel alta, ke la aliaj gentoj ekkoleris, kaj unutage la forĝisto Pinĉisto, kiu estis ĉefo de gento, subite perforte penetris lian vilaĝon kaptante la ŝipestron kaj lian genton. La ŝipestro kaj liaj subuloj petegis pri siaj vivoj, kaj oni ilin efektive indulgis kontraŭ tio, ke ili laboradu por la forĝisto kaj lia popolo, t. e. ke ili fariĝu iliaj sklavoj.

Sed timigita pro la minaca danĝero, Lasse, same, kiel aliaj, enviante la forĝiston kaj la ŝipestron, foriris por eltrovi novan metalon pli akran ol la kupro, kiu ne kurbiĝas pro batoj, kaj per siaj ferlancoj kaj hakiloj li do armis sian genton, kiu nun kaptis la gentojn de la forĝisto kaj de la ŝipestro. Sed nun Lasse devis pripensi pli da aferoj, ol li revis iam antaŭe, ĉar estis malfacile nutri kaj regi tiom da homoj sur unu sama loko, kaj la ĉasaĵo jam malpliĝis. Necese estis prizorgi novajn nutraĵojn, kiujn oni povas havi sub la senpera observado de siaj okuloj, kaj kiujn serĉi kurante en la arbaro oni ne bezonas. Pro tiu kaŭzo li kaptigis urojn, ŝafojn kaj kaprojn, kiujn oni alligis al arboj sur la herbejoj, kaj kies lakton kaj viandon oni povis uzi laŭvole, kaj nun li havis paŝtistaron sub sia potenco. Sed vintre estis necese, nutri la bestojn, kaj pro tio oni devis konstrui brutejojn kaj garbejojn kaj kolekti fojnon.

Sed baldaŭ oni enuiĝis je la sama nutraĵo, kaj malnovaj memoroj de la gaja tempo sur la Insulo de Feliĉuloj komencis sentiĝi en la stomakoj. Lasse, kiu jam bone uzis la tempon, eltrovis kelkajn herbospecojn, kies semoj post pistado kaj knedado kun lakto fariĝis bongusta manĝaĵo. Krom tio li eltrovis kreskaĵojn kun

dikaj radikoj, kiuj estis amaraj, kiam ili kreskis sur malgrasa tero, sed dolĉaj kreskante sur graso. Ĉar li malhavis plugilon aŭ dresitan tirbovon, li dehakigis kaj forbruligis arbarojn. Sur la cindro li semis siajn herb-kaj rapsemojn kaj per tio ekkomenciĝis la agrikulturo. Ĉiuj gentoj ne tuj sekvis la ekzemplon. Sed kelkaj faris tion. Sed kun la dehakado kaj forbruligo de la arbaro la ĉasbestoj malaperis. Plendoj pri la danĝera fumo ekaŭdiĝis de la najbaroj, kiuj ankaŭ komencis eksenti la guston de la kulturitaj herboj, sed malkonsentis forlasi la ĉason aŭ detruai la arbarojn. Pro tio ili iaforte perforte penetretis la teritorion de Lasse, kaj ili ne povis aprobi lian posedrajton tiom, ke ili koncedu al li la detruadon de la tero kaj de la ĉaso per forbruligo. Lasse devis forpeli ilin batale, sed dum kiam oni bataladis, oni ne povis labori. Pro tio la aliaj devis nutri kaj vesti la defendantojn de la kampoj. Tial Lasse ordonis ĝeneralan protektan imposton.

Nun tamen oni ekkomencis konstrui domojn kaj forlasis ĉiun penson pri ĉirkaŭvagado. Sed la plezuro de kvietaj hejmrastado estis altpreza, kaj nun Lasse neniam havis gajan tagon, ĉar senĉese li devis forigi disputojn kaj elpensi leĝojn kaj dekretojn.

VII.

La moroj fariĝis ĉiam pli maldelikataj. La agema vivado en la arbaroj plifruue alportis ion vivigan al la animoj, kaj la neebleco konservi la ĉasajon dum longa tempo, igis la homojn malavaraj. Nun, kiam oni povis konservi, la homoj fariĝis avaraj kaj pedantaj. La ĉasgentoj, kiuj ĉirkaŭvagadis ankoraŭ en la najbaraj arbaroj, opiniis, ke estas hontinda okupo forrabi la lakton de la bovinoj, kiun la naturo dediĉis al la bovidoj,

kaj kelkaj noblaj altanimuloj iutage decidis malhelpi perforte ĉi tiun bestoturmenton. La ĉasistoj longtempe malestimadis tiujn „bovidojn“, kiel ili nomis ilin, sed ili malestimis ilin multe pli, rigardante buĉon, kie dum plej malmildaj manprenoj la ligitajn bestojn oni pikvundis sen signo de kontraŭstaro kaj kolektis la sangon. Tio estis vido treege malplaĉa al la ĉasistoj, malofte vidantaj la agonion kaj neniam la sangoverŝon. Peter Snagg, kiu estis ĉefo de la ĉasistoj, ne povis sufiĉe esprimi siajn ĉagrenon kaj malestimon pro la progreso de la sovaĝeco. Pli malbone ŝajnis esti, kiam oni komencis forbruligi la arbarojn, kaj la homoj komencis manĝi herbon kiel bestoj. Unue Peter opiniis, ke la detruado de la arbaroj malbonigos la teron; plue li opiniis, ke estas naivege kulturi herbsemojn, kiam tiel vastegajn areojn okupas sekaj herberoj.

„Kia malpurema, kompatinda, brutigita popolo!“ li ekkriis, vidante ilin kurbfleksatajn super la pioĉo kaj la fosilo kaj fosetantajn en la tero, kiun post ricevo de rikolto oni devis sterki per fekaĵo. Tiom la sovaĝeco evoluis, ke ili manĝas fekaĵon! Ĉu ili ne veturtransportas ĝin el la brutejo sur la kampon, kaj ĉu ili ne veturigas pli poste en la garbejojn la grenon, kiu elkreskis el ĝi? Fi, kia popolo! Kaj tiam ili konstruas densajn domojn el traboj, en kiujn la aero ne povas penetri; kaj tie ili sidĝas, odoraĉante kaj hejtante tiel, ke, elvenante en la freŝan aeron, ili malbonfartas. Kaj plue ili ekvidas nenion el la mondo ol siajn bruligitajn kampopecojn kaj siajn karajn fekaĵamasojn ekster la angulo de la bovejo. Imagu, kiel spritaj kaj agrablaj ili fariĝas pro tia okupado!

Lasse, kiu iafoje ankoraŭ amike renkontis Petro-n, kutimis vortbatali kun li, ĉiam asertante, ke la agrikulturo igas la homojn pacemaj, ĉar, kiu havas sian semadon

sub libera ĉielo sin gardas malamikiĝi kun siaj najbaroj, kiuj povus forveturigi lian rikolton, dum kiam li dormas.

Sed Peter denove kontraŭdiris, ke homo, kiu posedas ion, neniam povas dormi trankvile, sed devas ĉiam timi perdi ion. „Kaj“, li daŭrigis, „kiel ligita kun la tero li sin sentus, kiel malfacile estus al li disiĝi de ĉi tiu mizera vivo, lasante siajn posedaĵojn sen kontrolo! Ekpluvego, hajlego, disrompita barilo ja povas eksterni ĉiumomente la fruktojn de la laboro. Timema gento rezultos el ĉio tio, sklavan brutigatan popolon li havos el tiuj terfosantoj, kiuj fine enradikigos al si la imagon, ke la mondo konsistas sole el iliaj terpecetoj.“

Lasse baldaŭ ekvidis la konsekvencojn. La servutulojn, kiuj estis altpreze nutrataj kaj malfacile gardeblaj, oni devis liberigi. Tiuj tuj foriris arbaren forbruligante. Kaj baldaŭ la tutan provincon de Lasse okupis terkulturistoj. Disputoj naskiĝis pri arbarpartoj kaj paŝtejoj. La brutoj de unu enpenetris kaj pieddifektis la kampojn de alia. Tiam fariĝis ĝenerala la postulo pri interkonsento kaj Lasse estis devigata ree sankcii la unuan kodon de la leĝaro aŭ la kodon pri la tero, per kio ĉiu akiris la posedrajton de la okupita de li tero. Sed baldaŭ oni komprenis, ke la leĝon oni ne obeas. Necesis do elpeni punon. Ĉar la loĝantaro jam komencis fariĝi tro densa kaj malliberejoj okazigus maljustan imposton al la senkulpaj, kaj krom tio ĉiuj deziris esti verdiktitaj al malliberejo, por ricevi manĝaĵon kaj loĝejon ne bezonante labori, oni opiniis, ke plej facile estas mortigi la malobeintojn al la leĝo. La vivo ankoraŭ ne estis al iu ajn tre alloga, ĉar kompare kun la pasinta feliĉa vivado sur la Insulo de la Feliĉo la nunan oni ĝenerale konsideris kiel ŝarĝon. Do, la mortpunon oni ĝojege akceptis kaj jen la krimkodo denove funkciis.

Sed novaj malakordiĝoj minacis. Lasse vidis, ke la aferoj komencis konfuzmiksiĝi, sed ebleco ne estis, ilin malkonfuzi; restis do nenio ol tiel daŭrigi, kiel oni komencis.

Post kelke da jaroj de senĉesaj disputoj kaj leĝodonadoj pri barildevoj, pri akvofaloj, kiujn kelkaj baris per mueliloj, tiel ke al aliaj ili difektis la fiŝkaptadon, pri starigo de vojoj sur la kampoj de aliaj, kiam unu ne povis atingi sian bienon sen transveturi la kampojn de aliaj ktp., okazis iutage, ke kamparano, kiel oni nomis tiujn, kiuj jam ekloĝis ĉirkaŭ kampoj kaj paŝtejoj, tute subite mortis. Li postlasis edzinon kaj ses infanojn, tri filojn kaj tri flinojn. Ĉiuj volis ekposedi la bienon, sed dispecigita ĝi ne povis nutri ĉiujn, kaj Lasse pli preferis havi unu kamparanon ol ses farmetistojn. Pro tio Lasse estis devigata, funkciigi la malnovan kodon pri heredaĵoj, laŭ kiu la plej maljuna filo restu ĉe la bieno subtenante la patrinon. La ceteraj gefiloj devis foriri en la mondon, serĉante oficon. Atentigite per tio la aliaj kamparanoj komencis fariĝi pli prudentaj ĉe la naskigado de infanoj, kaj poste oni vidis nur malofte, ke unu kamparano naskigis pli ol du infanojn, ĉar neniu volis igi siajn infanojn servistoj. Sed nun el tiuj, kiuj jam estis naskitaj kaj al kiuj ne restis plu da tero ekposedebla, komencis fariĝi klaso da malkontentuloj. Ili estis tre danĝeraj, ĉar ne posedante ion perdeblan, ili timis nenion. Ili foriris en la arbarojn, ĉar ili ne povis trovi iun kaŭzon, kial ili suferu sub servo por aliaj, kiuj prenas la fruktojn de ilia laboro. Lasse enŝlosiĝis dum multaj tagoj kun la pastro, penante elpensi argumenton por tio, ke kelkaj laboru kaj aliaj manĝu, sed ili ne povis trovi iun.

Nun, tamen, kiam la teron oni ne rajtis dispecigi,

okazis iufoje dum bonaj jaroj, ke la rikolto fariĝis tiel granda, ke pliaĵo rezultis kaj kamparano posedis de iu ajn speco pli ol li povis formanĝi. Tiam li ekpensis, interŝanĝe havigi al si el la pliaĵo de aliaj, kaj baldaŭ oni eksciis precize, je kiaj tempoj kaj en kiaj lokoj oni povis renkonti tiujn, kiuj havis ion interŝanĝeblan. Sur la foirejoj oni renkontiĝis, kaj tien la ĉasistoj alvenis kun siaj peltaĵoj, kun salo, fiŝoj kaj ĉasaĵoj, por ilin interŝanĝi kontraŭ greno, fromaĝo, butero kaj brutaro. Por plifaciligi la interŝanĝon, oni elpensis la uzon de zinkaj tavoloj, kiujn oni stampis per ciferoj kaj uzis kiel ŝanĝilojn. Sed kiam, tiamaniere, oni komencis kolekti riĉaĵojn, la envio fariĝis tiel granda ĉe la homoj sen parto kaj sen heredaĵo, ke ili ekokupiĝis pri rabado.

Nun la socio estis treege minacata, kaj Lasse devis rekrutigi armeon da ĉiamaj militistoj el tiuj malkontentuloj laste cititaj, pro kio la malnova armeo fariĝis ĉiam pli granda kaj novajn impostojn oni devis ordoni. La kamparanoj volonte pagis la imposton, supoze ke ilin oni protektu. Sed la sentaŭguloj, kiuj loĝis en la freŝe konstruita turo, manĝadis, trinkadis, ludadis kaj kantadis. Neniel ili estis okupataj, kaj pro tio al ili ŝajnis, ke ili estas pli gravaj ol la terfosantoj. Iliaj moroj estis maldelikataj, kaj ili neniel respektis Lasse-n. Ili foriris laŭ vojoj kaj vojetoj rabadante la revenantajn ŝanĝintojn de la foiro.

Longtempe oni aŭdis mallaŭtan malkontentecon flanke de la kamparanoj, kiuj ne deziris nutri al si tiranojn. La mortpuno timigis neniun, ĉar ili esperis ĉiuj reveni, post la morto, al la Insulo de Feliĉo, kaj ili iris al la morto kvazaŭ al festeno. Lasse nun estis devigata elpensi ion, kio ilin timigos de la morto. Kaj li ne bezonis serĉi longtempe.

Uffka, aŭ pli frue pastro Axonius, kiu jam enprofundiĝis en specon de bruta letargio, nun estis vekata, kaj oni lin forsendis, por prediki la politikan aŭ inferan religion. La plej gravaj tezoj de tiu ĉi bela dogmaro estis la jenaj: ĉiuj homoj, kiuj ne ricevis teron, estas mizeruloj; Dio ilin kreis, sed ili estis malobeemaj, kaj malobeemo kontraŭ la estraro estas la plej granda peko; pro tio do ĉiuj, kiuj ne ricevis teron kaj ne volas labori por aliaj, alvenos post la morto al la infero, kie ili estos rostataj eterne. Komence ĉi tiu sensencaĵo neniel impresis la animojn, ankoraŭ ne erarigitajn, de la popolo, sed la potenco de la kutimo estas granda, kaj iom post iom per pentritaj ilustraĵoj Uffka sukcesis timigi la virinojn pri la morto. Jen la unua paŝo. Sed la militistoj nur moktrompis la pastron kaj restis nekorekteblaj. Fine Lasse koncerne ilin devis uzi alian metodon. Li ilin subaĉetis. La landon oni nun dividis en guberniojn, por kies estroj oni elektis militistojn. Nun oni sufiĉe estris la kamparanojn, ĉar ĉiu guberniestro havis turon kaj garnizonon. Sed ĉi tiuj estroj senlime tirane premegis la kamparanojn kaj eĉ elpensis imposton pagotan de ĉiu komercisto, kiu transveturas ilian teritorion. Ĉi tiun imposton oni nomis limdepago, kaj oni ĝin pretekstis kiel ŝirmon por la komerco, t. e. kontraŭ la rabadoj de la „protektantoj“.

Tiamaniere la progresado iris antaŭen.

Lasse jam edziĝis kaj ricevis ok infanojn. Liaj elspezoj pligrandiĝis kaj necesis al li, ordoni novajn impostojn. Sed tiam la kamparanoj plendis. Ili devas mem nutri tiom da infanoj, ili diris, ke ili ne volas nutri tiujn de aliaj; ĉar junuloj kaj junulinoj tute neteneble naskis infanojn. Lasse estis devigata enkonduki novan statuton, per kiu al personoj, posedantaj

nek teron nek bienon, oni malpermesas je severa puno naski infanojn. Kaj por povi efektive kontroli tiujn, kiuj naskis infanojn, necesis al ĉiuj, kiuj deziris edziĝi, tion sciigi al Uffka, kiu devis antaŭe doni al ili ĝisfundan konon pri la infera dogmaro, kiun ĉiu viriĝintulo kaj plenkreskiĝintulino devis konfesi per juro. La gepatroj plendadis kaj ĝemadis, sed tio estis senutila, ĉar nun la militistaro decidis unua aŭ lasta ĉiujn aferojn de konscienco. Al tio kuniĝis alia cirkonstanco.

La virinoj, kiuj pro siaj infanoj metis sin sub la protekton de la viroj, pro tio enkuris dependecon de siaj edzoj iomete similan al tiu de servisto. Ĉiujn etajn oficojn ili faris endome, kaj la fratinoj, kiuj ne rajtis ricevi heredaĵon, servis al siaj fratoj. Tamen, ĉar ĉiu junulo-kampano, kiu deziris edziĝi, timis fariĝi malriĉeta pro plialtiĝontaj elspezoj, la knabinoj riskis restadi fraŭlinoj. Tiam la gepatroj ekpensis doni al ili doton, kaj fine duonan heredaĵorajton. La posedantoj de granda heredaĵo do fariĝis edzinoj pli facile ol tiuj, kiuj posedis nur malgrandan. Pro tio la bienuloj sin kuniĝis kontraŭ tiuj, kiuj ne posedis teron, kaj per tio ternobelego fariĝis flanke de tiu de la kruda perforto, t. e. la ŝtelnobelaro, sed sub ĝi.

Sed la ŝtelnobelaro konsistis el ŝanĝemaj sinjoroj, ĉe kiuj ankoraŭ postrestis gajaj memoroj el la ĉasista tempo, kaj por fari al si amuzon per io ili arogis al si la nemultajn ĉasejojn, kiuj troviĝis ankoraŭ, kaj al la kampanoj oni malpermesis la portadon de armiloj. Alia eltrovo, kiun ankaŭ faris ĉi tiuj ŝtelistoj kaj kiu elvokis la laŭrajtan indignon de ĉiuj kampanoj, konsistis en la dresado de lupoj, kiuj tamen, neniam fariĝis pli malsovaĝaj ol por obei siajn mastrojn, dum kiam ili mordis ĉiujn aliajn. Laŭdire la ŝtelistoj ilin bezonis

pro la ĉaso, sed fakte ili devis defendi la ŝtelaĵon, dum kiam la ŝtelistoj fordormis sian ebriecon. Tiu asociiĝo de la ŝtelistoj kun sovaĝaj bestoj kolerigis la kamparanojn treege, sed jam nun ili ne havis esperon aŭdigi siajn voĉojn.

Fine la ĉasemo de la sinjoroj komencis direkti sin kontraŭ ili reciproke, kaj unu faris ataketon kontraŭ la turo de alia. La kamparanoj ĉiam suferadis pro tio, ĉar iliajn kampojn la ĉevaloj de la sinjoroj pieddifektis; ĉar la sinjoroj ankaŭ asociiĝis kun tiuj bestoj, kiuj superis ilin laŭ fortoj. La kamparanoj malhavantaj armilojn, nenion kapablis kontraŭ armitaj viroj kaj sovaĝaj bestoj. Sed ili plendis al Lasse. Ĉi tiu, kiu jam longe vidis la ĉiam pligrandiĝantan konfuziĝon de la aferoj, ektrovis nenian rimedon ol armi la kamparanojn por helpe de ili kaj sia propra militistaro puni la sinjorojn. Kaj tion li do faris. —

Post tio nur restis la realigo de liaj intencoj, kaj li igis la popolon elekti lin ĉefo super ĉiuj ĉefoj, t. e. reĝo. Por doni al la entrepreno pli da brilo, li aranĝis grandan kronadon. Vestita per ruĝa lupopelto kun erinaca felo kun plumoj de garoloj, li igis Uffka-n ŝmiri lin per gudro ĉirkaŭ la buŝo sur granda herbejo, post kio la tuta popolo devis konfesi la inferan dogmaron per nova ĵuro kaj ĵuri, ke Lasse estas sendito de Dio kaj ke la dinastio Hulling devenas el Jafeto, la filo de Noaĥo. Pro tio ĉiuj aliaj turĉefoj estu obeemaj al li kaj donu al li imposton. Tiu ĉi lasta devo ne estis malfacilaĵo al ili, ĉar ili faris nenion, ol trudi al siaj kamparanoj novan imposton. Kaj tiamaniere Lasse I de la dinastio Hulling estis ŝmirita reĝo pro la graco de Dio. Sed por doni pli da brilo al la reĝa nomo li subskribis Lasse I Hugo de Hulling Jafetido.

Nun ekkomenciĝis tempo de sufiĉe granda kvieto, ĉar la dogmaro pri infero jam disvastiĝis, kaj la timo je la morto estis tiel granda, ke nur malmultajn krimojn oni faris.

Sed nova klaso de senbienuloj jam aperis. Kelkaj el tiuj, kiuj ne povis plu ĉirkaŭmigradi senĝene, ĉar la ĉirkaŭmigrado de nun estis puninda, kelkaj el tiuj ekloĝis ĉirkaŭ la turoj de la guberniestroj farante vestojn kaj ŝuojn al la mallaborema garnizono. Ili ricevis modestan pagon, sed ĝuis la protekton de la ĉefo, t. e. ili devis pagi imposton pro sia laboro por la mallaboremuloj. Sed la animoj de la homoj jam tiel konfuziĝis, ke la kompatindaj tajloroj kaj ŝuistoj ne divenis tiun trompon, kaj pro la enkonduko de la infera dogmaro la timo je la morto jam fariĝis tiel granda, ke oni preferis vivi en kia ajn kondiĉo, sub kia ajn premo, spite de kiaj ajn hontigoj ol riski la morton. Sed al la ŝuistoj kaj tajloroj ankaŭ necesis manĝi kaj trinki, kaj ĉirkaŭ la turo kreskis nenio.

Do la kamparanoj devis alporti al ili manĝaĵojn por vestaĵoj, ŝuoj kaj mono. Sed la sinjoroj konstruis muron ĉirkaŭanta terspacon ĉirkaŭ la turo, en la muro ili konstruis pordegon kaj ĉe la pordego skribiston, ĉar oni jam delonge havis skribistojn, kiuj pagon postuladis de la kamparano, ĉar oni permesis al li la importon kaj la vendadon. La kamparanoj ne povis kompreni, kial ili devas pagi pro sia laboro alporti manĝaĵojn en la urbon, kaj neniu ajn alia tion komprenis, sed tiel oni ja ordonis jam delonge.

Fine iutage, kelke da ruzaj komercistoj vizitis Lasse-n, kredigante al li, ke la agrikulturo ruiniĝos, se la kamparanoj veturadas en la urbojn, brokantante; pro tio ili prenis sur sin la taskon, aĉeti la manĝaĵojn de la kamp-

aranoj kondiĉe de la pago de certa imposto al la „kastorĉapo“; tiel oni nun nomis Lasse-n. Li konsentis je la propono, sed tiam la kamparanoj ekrefuzis vendi. Rezultis malsatego en la urbo kaj la kamparanojn oni ordonis, minacante per monpuno, vendi al la komercistoj. Tiam la kamparanoj kolerigitaj tiom altigis la prezojn de siaj komercaĵoj, ke Lasse tuj pretigis taksarojn, difinante la prezojn de brutaro kaj greno de la kamparanoj, kaj nun la estonteco de la urbo kaj de la ŝtelistoj estis garantiita, kaj paco kaj feliĉo regis kvin longajn monatojn. Pro tio Lasse ricevis de siaj militistoj la nomon Lasse Bruteja Seruro, ĉar li mem kvazaŭ tenis la seruron de la kamparana brutejo, kiun li malfermadis kaj fermadis laŭplaĉe.

VIII.

Tamen la paco estis nur ŝajna kaj neniel fidinda. La maljunaj kamparanoj, kiuj partoprenis la starigon de ĉio nuna, sendube malrespektis Lasse-n, kun kiu ili interrilatis iam familiare, sed nun li havis la kapablon ilin protekti per la militistaro; ili tediĝis tiam pri la malpaco kaj cedis. Kion fari? ili demandis al si, kaj kiam nenio estis farebla, oni kutimiĝis al silento kaj sufero.

Sed ne tiel facila estis la obeigo de la juna generacio, kiu volis obei nek patron nek patrinon, des malpli do fremdajn personojn. Vane Uffka provis ilin timigi per la infera dogmaro. Iliaj pensoj estis ankoraŭ neerarigataj, tiel ke ili divenis la absurdecon de la tuta mensogohistorio kaj ridis pri Uffka. Ili fariĝis sovaĝaj kaj senbridaj, ili ne toleris la restadon en la malsanigaj, malbone odorantaj dometoj, sed trakuris arbarojn kaj kampojn, serĉante aventurojn. La gepatroj ilin bastonadis, sed la knaboj ekbruligis dometojn kaj fojnostakojn kaj for-

kuris en la arbaron. La socio estis ĉi tiun fojon serioze minacata, kaj iu serioze proponis, ke oni kastru ĉiun duan knabon, por havigi al si laboristojn por la estonteco. Sed Lasse malkonsentis tian nenaturan procedon. Li proponis alian metodon, kiun li ŝparis plejeble longe, ĉar li mem ĝin malaprobis pro ĝia kontraŭnatureco kaj nehumaneco. Li ja partoprenis kiel infano saman kurson, kies memoroj lin turmentadis ankoraŭ kiel fantomoj kaj ĝin ŝajnis al li kiel la plej terura, kion li spertis. Ĉiu vilaĝo starigu punĉambron, kie oni internigu la infanojn dum ses jaroj, por ke ili kutimiĝu ĉiutage pere de duona malsato kaj batoj de bastono al sklaveco, kaj aŭdante jaron post jaro la inferan dogmaron kaj novan moralon, kiun elpensis Lasse kaj Uffka, ili enradikigu al si iom post iom en la konscion la respekton kaj obeemon, kiujn, laŭnature, ili ne ŝuldas al iliaj superuloj. La metodo estis treege senkonsciencia, sed ĝi havis la saman efikon kiel kastrado.

Kelke da tempo tamen estis necesa por la verkado de la lernolibroj, sed la profito antaŭvidata estis tro granda, por ne dediĉi tempon kaj antaŭzorgon al la nova institucio.

Kiam la laboro estis preta, ankaŭ vidiĝis, ke oni jam atingis la celon. La infanojn oni internigadis frumatene, kaj unue ili lernis silenti. Tio estis plej grava, ĉar nun la altrangularo, kiel ili nomis sin, ĉar „Dio“ metis ilin super la subularo, ne bezonis timi kritikon flanke de la subularo. Due ili lernis obei, t. e. fari la volon de aliaj kaj havi neniun propran. La internigado de multe da infanoj en unu saman ĉambron bonege efikis, ĉar la nesana aero difektis la sanecon, kaj kun la malaperado de la saneco ankaŭ malaperis forto kaj volo. Sed la kutimo silenti, t. e. ne diri la veron, okazigis neoportun-

aĵon, kiun oni komence ne antaŭvidis. La infanoj nome ektrovis, ke, respondante jes, kie ili juste devas respondi ne, ili akiris profitojn, kiel rekompencojn aŭ liberigon de puno, kaj pro tio la mensogo komencis ekflori. La obeemo siaflanke okazigis perfidecon. La infanoj opiniis agi maljuste tenante kamaradon, dum kiam la instruisto lin bastonadis, sed agante kontraŭ tio, kion ili opiniis justa, ili iom post iom kutimiĝis al agado kontraŭ sia konvinko. Kiuj mensogis plej multe kaj estis plejeble perfidaj, tiujn oni nomis bonaj infanoj, kaj ili ricevis spicokukojn kaj mielfrandaĵojn; tiuj, kiuj estis verdiremaj kaj sinceraj, batojn ricevis, sed nenian manĝaĵon. Per tio oni jam starigis la bazon de la edukado. Lasse iufoje mirkonsterniĝis pro la rezultatoj, sed, jam suririnte la glatan glacieron, kion fari?

Tamen al la infanobatantoj estis malfacile, okupigi la infanojn dum la longa lernotempo nur per la bastono, kaj necesis elpensi novajn fakojn. En la lernejo oni lernadis depost nun krom mensogo kaj malveremo, grandan aron da malveraĵoj, kiujn sub la komuna nomo de „moralo“ oni lernigis per la bastono al la palaj kaj malsanaj infanoj. La unua moralo nomiĝis: Dio kreis kamparanojn kaj metiistojn, por ke ili laboru por tiuj, kiuj ne volas labori. La dua moralo: Vi estu kontenta je via sorto! (Plenumi ĉi tiun ordonon ne estis malfacile al tiuj, kiuj ĝuis la enviindan sorton, esti liberigataj de laboro, sed al tiuj, kiuj havis la penigan sorton labori, ĝi estis neebla.) Tria moralo: Vi ne sekskuniĝu, se vi ne posedas sescent arojn da tero aŭ la permeson de Uffka. (Grandan knabon, kontraŭdirantan, ke al ĉi tiu moralo oni donu la jenan tekston: Estas necese, ke vi jam forprenis sescent arojn da tero por esti „permesata sekskuniĝi!“ oni ĵetis en malhelan kelon.) Kvara

moralo: Vi ne forprenu la havaĵon de alia! (Knabinon, opiniantan, ke ŝi memoras, kiam ŝia patro rabis sian teron el la komuna herbejo, kaj ke pro tio oni punu ŝian patron, oni konvinkis per ses paroj da vergoj, ke ŝi estas malprava.) Kvina moralo: Vi ne mortigu iun ajn! (Neplenaĝulon, kiu demandis, ĉu per „vi“ oni enkalkulas ankaŭ Lasse-n kaj la ekzekutiston, kiuj mortigas ĉiujn, kiuj ne volas mortigi la ĉasistan popolon en la arbaroj, oni metis en la trunkon.) Sesa moralo: Vi ne devas eĉ pripensi, ĉu tio, kio nun estas, povas esti malbona. (Ĉi tiu ja estis la plej bona el ĉiuj moraloj, ĉar ĝi mortigas ĉian personon kaj pro tio ĉian opozicion jam en ĝia ĝermo.)

Sed tio, tamen, neniel utilis. La gejunularo hipokritadis kaj mensogadis, sed kelkfoje la vero ekaŭdiĝis, kaj tiam la socio denove estis minacata. Oni tiom tediĝis je la vivo, ke oni tute malzorgis la laboron kaj ĉion: oni mem malsatis, sed tiam ankaŭ la altrangularo komencis malsati kaj malbonfarti, kaj tio ja ne devis esti. La timo je la infero ĉesis, ĉar oni opiniis, ke oni jam havas inferon sur la tero, kaj oni ja pli malbone ne povas vivi. Lasse kaj Uffka baldaŭ samopiniis, ke estas necese, fari kelke da laŭtempaj ŝanĝoj en la infera dogmaro, kaj nun la pastroj komencis paroli iom pli pri la venonta ĝojo de la ĉielo al ĉiuj, kiuj suferis kaj spertis malĝojon en la vivo. Ke pro tio kelke da opoziciuloj aludis, ke sekve Lasse kaj la altrangularo, kiuj vivas agrable, venos al infero, ne influis la aferon, ĉar la opoziciulojn oni bruligis sur ŝtiparo, kaj al iliaj demandoj oni donis nenian respondon. Sed la espero veni ĉielen senfortigis la disciplinon, kaj estis necese, elpensi novajn rimedojn. Jen Lasse igis kelkajn sentaŭgulojn, kiuj ne volis labori, fari kantetojn por la priinformo de la sub-

ularo. Kaj nun alvenis aro da poetoj. Ili sin vestis malbone, kvankam ili tion ne bezonis, ĉar ili ricevis sian salajron de la ŝtato, sed ili devis kredi al la subularo per sia eksterajo, ke ili elvenas el la subularo. Ili ĉirkaŭiris, kantante, ke la vivo estas tiel agrabla; ke oni kredu ĉiujn homojn bonaj; ke ĉiuj Lasse-oj, Uffka-oj, guberniestroj, gepatroj, kuratoroj kaj instruistoj estas tiel bonaj celante la bonstaton de la subularo; ke ĉia malkontenteco pri tio, ke kelkaj laboradas, dum ke kelkaj formanĝadas, estas nenio krom envio kaj malico; ke kiam ĉiu prizorgas siajn oficojn, ĉio iras bone, kio ajn nin renkontas; ke la agrikulturo kaj la metio ne estas ia laboro, sed ke la efektivan laboron, la pli penigan laboron Dio metis sur la estraron, la militistaron kaj la Uffka-ojn; ke necesas preni la mondon kiel ĝi estas (ankaŭ tiel, kiel ĝi jam fariĝis pro la friponaĵoj de Lasse-oj kaj Uffka-oj!) Tio efikis. Oni unue lernis la kantetojn parkere, tiam ili sidis en la oreloj kaj fine ili trapenetris la pensojn.

Sed baldaŭ vidiĝis, ke ankaŭ la subularo ekkomencis uzi kantetojn por ataki la altrangularon. Lasse kun teruro vidis la minacantan nubon, sed ne nur por plezuro li akiris spertojn dum la pasinteco. Unue li provis doni al la kantistoj salajron el la ŝtata kaso. Tio efikis dum kelke da tempo, sed jen arego da kantistoj, demandante salajron, kaj la impostoj plialtiĝis. Tiam, kiam nenio alia efikis, li vidis sin devigata al la severa neceso, starigi socion. Deksep el la plej timindaj kantistoj oni elektis, kaj ilin oni deklaris seneraraj. Ĉiujn aliajn, kiuj volis verki kantetojn, oni deklaris sentaŭgaj. Per tio la afero estis helpata. La popolo, kiu pagis la deksep por esti de ili mallaŭdata, baldaŭ kutimiĝis en la lernejoj, rigardi la deksep seneraraj kaj ĉiujn aliajn sentaŭgaj.

Kaj per tio oni silentigis ĉiujn malkontentajn kantistojn, ĉar kompreneble neniu volis kantadi sen laŭdo, almenaŭ de la deksep, kaj tio kaŭzis, ke pli poste ĉiujn kantojn oni komencis kantadi laŭ la sama maniero.

Ĉar nun la nombro de la lernejoj pligrandiĝis kaj la malfacileco fariĝis granda, havigi al ĉiuj morallibrojn, Lasse estis devigata post multe da pripensoj — ĉar tiel longe kiel eble li timis konigi tian danĝeran inventaĵon — starigi presejon. Sed por ke oni ne uzu la danĝeran aranĝon kontraŭ li kaj lia verko, li ĝin metis sub reĝan kontrolon.

La unua produktaĵo de la reĝa presejo estis statuto pri la preslibereco. En la sekreta societo „La malkontentuloj“ oni aranĝis kunvenon iuvespere sur fojnejo, ĝuste kiam elvenis la nova statuto pri preslibereco. Paŭlo Ĉasisto jam ricevis unu ekzempleron kaj devis ĝin laŭlegi por ĝia submetigo al ekzameno. Oni sin preparis por aŭskulti.

Paŭlo komencis legi: „Statuto pri preslibereco. § 1. Ĉiu ŝtatano havas la plenan rajton esprimi sin per presaĵo!“

„Hura!“ respondis la malkontentuloj. „Vivu la libereco!“

— „§ 2“, legis Paŭlo, „la puran evangelian inferodogmaron oni ne rajtas submeti al nebezonata kritiko, ĉar ĝi devenas el Dio!“

„Ho!“ diris la malkontentuloj. „Ĝin ni antaŭ ĉio volus kritiki.“

„§ 3“, legis Paŭlo, „ĉiu verkisto devas sin esprimi laŭde pri Lasse, Uffka, guberniestroj, militistoj, skribistoj, instruistoj kaj iliaj amikoj kaj konatuloj“.

„§ 4. La Societo Por Reciproka Laŭdo aŭ la deksep seneraruloj rajtas subpremi ĉian skribe faritan provon adresitan kontraŭ la moralo.“

Ĉi tie Rudolfo Karbisto interrompis: „Ni ekmemoru, kion signifas la moralo!“

Paŭlo Ĉasisto memorigis: „Moralo signifas unue, ke ĉiuj kamparanoj kaj metiistoj naskiĝis por labori por Lasse, Uffka-oj ktp.; due, ke neniu rajtas sekskuniĝi, se li ne posedas 588 arojn aŭ la permeson de Uffka“.

„Sufiĉe, sufiĉe,“ ekkriis la malkontentuloj, „ni tion tre bone rememoras. Daŭrigu!“

„§ 5. Neniu krom la Societo Por Reciproka Laŭdo rajtas esprimi sin pri mortinta Lasse-ulo.“

„§ 6. Ĉiu ŝtatano plene rajtas esprimi sin prese“.

La malkontentuloj disiĝis kun la firma decido, uzi la novan presrajton ĉe la plej baldaŭa okazo.

La instruistoj unue ricevis produktaĵon de la presrajto, kaj la Morallibron oni presis en miloj da ekzempleroj, oni ĝin najlfiksis en la dometoj kaj distribuis inter la subularo, ĉar la altrangularo, kiu inventis la Moral-libron, ĝin konis antaŭe parkere.

Sed Lasse fariĝis laca kaj maljuna, kaj li sentis sian vivfinon alveni. Post kiam li kunvenigis dumil militistojn, li igis ilin elekti tronheredonton. Kaj jen lian filon oni elektis, kiun oni tuj honoris sub la nomo Lasse II Axel. Lasse ploris pro emocio je tia grandioza pruvo de la amo de la popolo kontraŭ lia familio, kaj li uzis nesercitan okazon por proponi, ke la kastoroĉapo kaj la trono fariĝu heredaj interne de lia gento. Ĉar aŭdiĝis malkontenteco pro tio inter la guberniestroj, Uffka ekparolis, apelante al la popolo, kiu staris tre malproksime en la arbaro malantaŭ la militistoj. La popolo, malamante la militistojn kaj aŭdinte nenion ol tion, ke ĉi tiuj jam respondis per ne, kompreneble jeskriis, kaj nun la militistoj devis kapitulaci. Lasse dankis pro ĉi tiu nova pruvo de la amo de la popolo, kaj li konsideris ĉi tiun krion el la „malaltaj rangoj“ kvazaŭ Dio mem estus parolinta, ĉar la voĉo de la popolo estas voĉo de

Dio, kaj Lasse II rapidis akcepti la tiel belan kiel malveran devizon: „La Amo de l'Popolo post mia salajro!“

Lasse, kiu travivis tiom da diversaj okazintaĵoj, kuŝiĝis sur la mortlito, sata je jaroj kaj gloro. Pardoninte al ĉiuj siaj malamikoj iliajn krimojn kaj ricevinte de Uffka la certigon pri la ĉielo, li ekmortis. Ĉiuj la deksep seneraruloj skribis laŭdkantojn pri lia faraĵriĉa vivo, kaj Uffka faris funebran paroladon laŭ la teksto: feliĉaj estas la mortintoj, kiuj mortas en la Sinjoro. Lasse II forviŝis siajn larmojn kaj ekokupis la tronon.

IX.

Lasse II Axel estis milda sinjoro, kiu ne amis la militon, sed al kiu plaĉis civilizacio kaj scienco. Lia unua regadfaro estis la skribigado de la historio de Lasse I. La deksep seneraruloj komencis la verkon, kaj ili sukcesis krei majstraĵon de daŭranta valoro. En ĝi oni nomis Lasse-on la Granda, kaj juste, ĉar li fondis la novan konstitucion kaj li ĉiam havis la bonstaton de la popolo kiel sian plej altan celon. Sed la societo „La Malkontentuloj“ skribis alian historion pri Lasse, kie oni lin nomis simple „La malsaĝa Huling“. Ili deklaris, ke li enkondukis la nunan sklavecon kun nutrado kaj konsumado, kun impostoj al la laborantoj kaj liberigo de impostoj al la mallaboremuloj, ke li difektis la sanon de la junularo per la enkonduko de malliberejoj kaj instruistoj, ke li estis stultulo kaj ke lia socio estas idiota. La libron oni konfiskis kaj bruligis kune kun la verkintoj, post kio la Societo Por Reciproka Laŭdo anoncis premion de ses funtoj da zinko por tiu, kiu verkis la plej belan nekrologon pri Lasse I Hugo, nomata La Granda.

Tamen, ĉar Lasse II Axel komprenis, ke la malkontentecon pri la socio oni ne povas tuj forigi, li verkigis

historion de la regno, en kiu, helpe de la postlasita ekzemplero de „*Atlantika*“, de Rudbeckius, aparteninta al Lasse, patro de Lasse II, oni plenpruvis, ke sendube la nuna regno estas la plej perfekta el ĉiuj regnoj, kaj ke efektive ĉi tiu estas „*Atlantika*“ aŭ „*La Insulo de Feliĉuloj*“. La insulo, en kiu loĝis iliaj prauloj kaj kie ili opiniis esti tiel feliĉaj, neniam ekzistis. Tio nur estas artifiko de la „Malkontentuloj“ por igi homojn malkontentaj. Kaj nun la instruistoj enkondukis novan lernolibron, kiun oni nomis „La Laŭdado de la Nuntempo“ aŭ „La plej perfekta Socio“.

Tamen jam plenkreskis aro da infanoj de skribistoj kaj militistoj. Por eviti, same kiel ĉe la elektado de reĝo, malpacon kaj malkonkordon, oni enkondukis la kutimon, ke la oficoj fariĝu heredaj, sed ĉar skribistoj kaj militistoj senĝene naskigis infanojn sen 588 aroj da tero — ili ja staris super la de ili donita leĝo — la lando baldaŭ estis surŝutata je altrangulidoj ne havantaj oficon. Ilin la ŝtato nutradis per stipendioj aŭ rekompencoj, por ke ili ne bezonu ŝteladi aŭ mortigi kaj al kiel eble plej multaj oni kreadis oficojn. Sed ĉar al la senfaruloj estis malfacile fari nenion, ili elpensis ĉiajn okupetojn, pli-malpli idiotajn. Unu ekdecidiĝis kolekti butonojn; alia kolektadis abikonusojn, pinkonusojn kaj juniperkonusojn; tria homo havigis al si stipendion por forveturi eksterlanden. Tiu lasta hejmenrevenis post eltrovo de mortinta lingvo, kiun li trovis sur lignaj tabuletoj. Ĉar ankaŭ troviĝis ŝlosilo de la lingvo, ĝia deĉifrado estis facila, kaj la eltrovinto, kiu nomis la lingvon „Ŝoŝo“ estis tre fiero scipovi lingvon, kiun sciis neniu alia. La kolektanto de butonoj kunigis teruran kolekton. Ĉar li ne sciis, kie ĝin deponi, li el la ŝtata kaso ricevis monon por konstrui domon por la loĝigo

de la kolekto. Ĉi tie li ekkomencis ordigi la butonojn. Estis multe da manieroj por ilin klasifiki: oni povis ilin klasifiki en kalsonbutonoj, pantalonbutonoj kaj jakbutonoj ktp., sed nia viro elpensis pli artifikan kaj pro tio pli malfacilan sistemon. Sed pro tio li bezonis helpon. Li unue verkis disertacion pri „Neceso studadi la butonojn el scienca vidpunkto“. Poste li adresis al la Trezorejo petskribon, en kiu li petis pri profesoreco en la scienco de butonoj kune kun du asistantoj. La peton oni malrifuzis, pli por havigi okupeton al senfaruloj ol pro la afero mem, kies valoron oni ankoraŭ ne povis prijuĝi. Ĉar la viro — li nomiĝis Hylling kaj oni opiniis, ke lin naskis Hullingulo sen permeso de Uffka — havis okaze du bastardajn filojn, kies lernejan bastonigadon li ne povis pagi, oni ne bezonis anonci la asistantoficojn. Hylling estis baldaŭ mirigonta la mondon pro la unua kompleta scienca sistemo. Post du jaroj li jam estis elaborinta ĝin, kaj ĝi estis mirinda, giganta laboro, ĉar laŭ ĝiaj klasoj oni povis subordigi ĉiujn butonojn de l' mondo. La sistemo havis la jenan aspekton:

Butonoj:

Zinko	Kupro	Stano	Fero	Osto	Ligno
-------	-------	-------	------	------	-------

Kun truoj:

1-a klaso:	Kun	1	truo
2-a	„	„	2 truoj
3-a	„	„	3 „
4-a	„	„	4 „

Sen truoj:

1-a klaso:	Sen	1	truo
2-a	„	„	2 truoj
3-a	„	„	3 „
4-a	„	„	4 „

Kun laĉotruoj:

- a) ronda laĉotruo
 - α) kanelitaj
 - β) nekanelitaj
- b) ovala laĉotruo
 - α) kanelitaj
 - 1. laŭlarĝe kanelitaj
 - 2. laŭlonge kanelitaj
 - β) nekanelitaj
 - 1. vakanta (aŭ: ankoraŭ neekzistanta)
 - 2. vakanta ktp.

Ĉi tio kaŭzis grandan sensacion.

Sed la kolektinto de konusaj fruktoj ne volis esti malpli bona, kaj li baldaŭ mirigis la mondon pro granda artifika sistemo, laŭ kiu ĉiujn konusojn oni klasifikis en 67 klasoj, 23 familioj kaj 1500 ordoj.

Nun oni jam delonge intencis pligrandigi la instruadajn kursojn, kaj opiniante, ke estas maljuste, ke la infanoj de la subularo lernis tiom, kiom tiuj de la altrangularo, oni decidis starigi universitaton. Oni jam havis tri sciencojn: la lingvon „Ŝoŝo“, la butonsciencon kaj la konussciencon, kiuj depost nun fariĝis devigaj sciencoj. Sed ĉar siajn infanojn ankaŭ sufiĉe bonstataj kamparanoj kaj metiistoj sendis al la universitato, oni starigis „kolokviojn.“ aŭ „apartajn interparoladojn“, en kiuj rajtis partopreni nur la altrangularidoj, kaj sen tiuj interparoladoj oni ne povis fari ekzamenon. Tamen, se iu subularido pene sukcesis fari ekzamenon, li spite de tio ne ricevis oficon, ĉar la oficoj ja estis heredaj.

Lasse II Axel mortis — tion oni ja ne povis malhelpi, sed post la morto li ricevis la nomon Lasse Saĝulo.

X.

La filo, kiu ekokupis la tronon, sin nomis tute simple Anders VII, pro kia motivo oni ne scias, sed oni opinias, ke estas pro iaj historiaj supozoj. Dum lia regno naskiĝis la belartoj. Bakista lernanto nome iutage estis knedanta paston; li estis faronta panon, sed anstataŭe li faris kapron. La profesoro de la Ŝoŝo-lingvo, kiu okaze preterpasis la fenestron, kie laboris la lernanto, tuj komprenis liajn grandajn talentojn kaj igis lin fari kapron el argilo anstataŭ pasto, kaj li ĝin poste hardbruligis en forno.

Pri la eltrovo de la pentrarto la afero estis alia. Oni jam delonge observis en izola parto de la insulo, ke nombro da senlaboraj karbistlernantoj kutimis preni karbopecon por surdesegni la trunkojn. Unue ili nur desegnis malĉastaĵojn, sed pli poste ili desegnis ĉion, kion ili vidis. Oni unue opiniis, ke speco de manio aŭ idiotismo estiĝis, ĉar estis certe strange vidi aron da junuloj ĉirkaŭkurantaj kiel pigoj por desegni ĉion, kion ili vidis. Ili desegnis tablojn, seĝpiedojn, domojn, arbojn, ŝtonojn, karotojn, puŝĉarojn, hundojn, katojn, ĉion eblan, kion ili trovis. Vane la gepatroj penadis igi ilin forlasi tiujn kapricojn kaj fari ion utilan, sed tio ne estis ebla. Ili ekploris, dirante, ke ili pli preferas malsatiĝis mortiĝo ol forlasi la desegnadon. Sendube tio estis manio.

Kiam la aferon oni rakontis al Anders, li unue fariĝis tre malĝoja, ĉar li amis sian popolon tiom, kiom nur princo povas tion fari. Poste li internigis ilin en domon, kie ili rajtis sin dediĉi senĝene al sia manio kaj eĉ sub reĝa protekto. Li aranĝis eksperimenton kun ili, kaj iutage li igis kvindek maniulojn figuri la saman seĝpiedon. Sed, ho ve, troviĝis eĉ ne du similaj desegnaĵoj. Filozofoj,

kiujn oni alvenigis, deklaris, ke tio dependas de la persona percepto. Anders, kiu ĝis nun ne kredis, ke la persona percepto de seĝpiedo povas esti io filozofia, nun komprenis sian eraron kaj plenkredis la grandan gravecon de la figurado kiel momento de la spirita vivado, kaj li nomigis la plej lertan desegniston profesoro. Ĉi tiu tuj verkis disertacion pri enhavo kaj formo de la figuraĵo. El la zorge elektita ekzemplo, seĝpiedo, kiu konsistigis la premiotan temon, li deduktis: la enhavo de la seĝpiedo estas la persona percepto, la formo de la seĝpiedo estas la desegnaĵo. Kiam la enhavo kaj la formo kovris unu la alian aŭ tute eniris unu en la alian, tiam la desegnaĵo estas kompleta desegnaĵo aŭ io bela. Ĉio figurita estas bela; fekanta bovino estas malbela per si mem, ĉar la naturo estas malbela, sed figurita fekanta bovino estas bela, ĉar ĝin penetras la persona percepto de fekanta bovino.

Iutage oni trovis malbelan desegnaĵon de Anders VII sur la fasada muro de la desegnejo. Pasantoj ekridegadis. La desegniston oni alvenigis kaj ordonis, ke li figuru reĝon Anders, sed laŭ bela maniero. La desegninto deklaris, ke lia desegnaĵo estas bela, ĉar ĝin trapenetris kaj okazigis lia persona percepto pri Anders VII. La desegniston oni ordonis minace de mortpuno, tuj ŝanĝigi sian personan percepton pri Anders VII. Ĉar al la desegninto oni promesis nomon kaj salajron de profesoro, li tuj ŝanĝigis sian personan percepton pri Anders VII, kaj pro tio oni lin nomis reĝa pentristo.

Anders mortis dum la oka jaro de sia regno, kaj lin la deksep seneraruloj nomis Protektinto de la desegnaĵoj. Lin sekvis kiel reĝo Per Erik I. Ĉi tiu estis malcedema sinjoro, kiu ne povis sidi kviete. Li militis kontraŭ la ĉasistoj, mortigante kiel eble plej multajn. Sed la popolo

plendis pro la militimpostoj, kaj ili ne povis kompreni la utilon de tiaj buĉigadoj. Por sciigi ilian malbrilarintelekton, Per resumigis novan lernolibron por ĝin enkonduki en la lernejojn. Ĝin oni nomis „Libro pri Reĝoj“ kaj ĝi enhavis laŭdon pri ĉiuj reĝoj de Lasse III. Per Erik; precipe oni laŭdis ĉiujn atakojn kaj rabadojn al fremdaj regnoj.

Tamen la militirojn oni daŭrigis dum Per Erik, ĉar la militistoj amis la gloron kaj precipe la akiradon de fremda havaĵo, kiel horloĝoj, teleraroj kaj mono. Unu el la societo „La Malkontentuloj“ verkis pro tio broŝuron kun la titolo: „Komparo inter diversspeca ŝtelado privata aŭ publika“ aŭ „Ŝtelado el vidpunkto de publika juro kune kun tabelo pri la internaciaj ŝteloj dum la regado de la lastaj reĝoj de la familio Hulling“. La broŝuro oni bruligis kiel kutime kune kun la verkinto. Per Erik mortis pro drinkemo, kaj (kiel historiisto ni devas ne kaŝi la veron) eble ankaŭ pro malĉasteco. Lin funebris ĉiuj militistoj, nomante lin: „Heroa reĝo“ aŭ „La Nekomparebla“.

Kun li estingiĝis la familio de Hulling, kiu komenciĝis kun La Grandaj Lasseuloj. Ĉar oni jam enradikigis a la plenkreskinta generacio en la memoron, ke la reĝo devenas de Dio, estis sufiĉe malfacile, nun elekti reĝon inter la indiĝenoj, ĉar oni ja ne povis kredigi al la popolo, ke hieraŭan militestron oni povus elekti hodiaŭ kiel deveninton de Dio. Pro tio oni forsendis al malproksime loĝantaj gentoj ekspedicion, kiu alvenigis efektive viron, kiun oni baptis kaj kronis rapide. Por fari lin plamata oni lin nomis Lasse III, deklarante, ke per iama parenceco li apartenas al la familio Hulling. Ĉar li nek scipovis la lingvon de la lando nek sciis ion pri la lando, kiun li estis regonta, la potenco falis inter la

manojn de Uffka (ido de pastro Axonius el Upsala). Ĉi tiu ĉion faris por enradikigi en la animon de la popolo la inferan dogmaron kaj komisiis al la profesoroj de la desegnejo la figuradon de Infero, kiun oni alkroĉigis en ĉiuj preĝejoj. Lasse mortis kaj post lia morto oni lin nomis „Lasse Sanktulo.“

Dum la regado de lia sekvulo Per II Erik terura religia batalo naskiĝis inter la provincoj. Revulo ja deklaris, ke la malfeliĉulojn en la infero oni ne pinĉas per preniloj, sed pikas per forkegoj. Grandan kunsidon oni aranĝis, kaj vortbatalon oni daŭrigis dum dek ses tagoj kaj dek ses noktoj pri preniloj kaj forkegoj, pro kio la partioj ricevis la nomojn Preniloj kaj Forkegoj. La demandon oni difinis laŭ la postuloj de la Preniloj. Sed la Forkegoj firme persistis sian kredon kaj eĉ ne cedis spite de la minaco, ke ilin oni bruligos. Kaj nun la Forkegoj, akirinte la superecon en unu provinco, komencis sin defendi kontraŭ la perforto de la Preniloj. La Preniloj embarasiĝis kaj petis helpon de Per II Erik. Per Erik kunveniĝis la popolon, kaj kun larmoj en la okuloj li ĵuris, ke li defendos la puran inferan dogmaron aŭ perdos sian vivon. Kaj tiam li foriris en la militon. Ĝi daŭris dekkvin jarojn, kaj unu plenigita je horloĝoj kestegon post la alia oni hejmensendadis, kaj kolektadon de rekrutoj kaj dekreton pri novaj impostoj oni faris unu post la alia. Sed la Forkegoj sin brave defendis. Fine alvenis terura mortsciigo anoncante, ke Per Erik pereis. Sed la funebro iomete malpligrandiĝis, kiam oni aŭdis, ke la Preniloj batalakiris du provincojn, ses mil standardojn kaj tamburojn, kvincent horloĝojn kaj tri milionojn en oro kaj arĝento. La kadavron de Per Erik oni hejmveturigis kaj super lia restaĵo oni konstruis preĝejon kun jena surskribo: „Al Heroa Reĝo,

Defendinto de la pura infera dogmaro, kiu mortis por sia prenilo. La Animo verŝajne estas ĉe Dio.“

Ĉi tio estis la plej bela paĝo en la laŭdlibro de la Hulinguloj. Sed la Forkegoj daŭre persistis en sia kredo, kaj fine ili ricevis laŭvolan religian praktikadon. Eĉ ekzistis homoj (el la malkontentuloj), kiuj pretendis, ke oni batalis pri bagatelo, ĉar ja estas tute egale sciigi, ĉu en la infero oni estos pinĉata per forkego aŭ per prenilo, ĉar oni ja scias, ke ekzistas neniam infero.

Post Per Erik fariĝis reĝo Jøens I Filip. Li enkondukis la teatraĵon por bonhumorigadi la malkontentulojn. Sed ĉar ankaŭ la malkontentuloj faris teatraĵon, oni iliajn teatraĵojn deklaris pekaj, kaj oni konstruis nacian teatron, en kiu oni nur prezentis scenojn el la Laŭdlibro kaj La Milito de la Preniloj kontraŭ la malfidelaj. Pro tio oni kutimigis la popolon, respektante suprenrigardi al siaj „grandaj memoraĵoj“.

Sub la regado de la sekvulo Jøens II Petter oni ekeldonis la „Ŝtatgazeton“. Al ĝi impulsis parte la fermentanta malkontenteco, parte la neceso, disigi plejeble rapide la opiniojn de la altrangularo. La celo de la „Ŝtatgazeto“ estis: senĉese deklari, ke ĉio, kion pensas, parolas aŭ skribas la subularo estas mensogo; ke ĉiajn agojn de la subularo okazigas malnoblaj motivoj, egoismo, envio kaj malicemo; deklari, ke la nuna socio estas la plej perfekta, kondukanta al ĉies feliĉo; prediki, ke la infera dogmaro estas la plej milda, plej profunda, plej sprita de ĉiuj dogmaroj, kiun oni ne povus anstataŭigi per ia ajn alia, ke ĉiuj aliaj dogmaroj estas malsaĝaj kaj malmoralaj ktp. Ĉi tiun elpensadon oni bonvenigis ĝojkrie kaj „La Ŝtatgazeto“ prenis pro tio la nomon: „La Publika Opinio“ aŭ „La Benata Malaktiveco“.

XI.

La „Socio“ jam nun atingis la supron aŭ idealon de absurdeco. La utilon oni malestimis kaj la senutilon oni honoris. Estis do pli honorinde figuri pomon, pro kio oni fariĝis profesoro kaj kavaliro, ol kreskigi pomujon, pro kio oni nur fariĝis impostpaganto. La prezentadon de teatraĵo oni estimis kaj honoris multe pli ol la verkadon de teatraĵo, kaj iafoje, vidinte bonegan teatraĵon, oni vidis la publikon jungi sin antaŭ la veturilon de aktorino, por tiri al ŝi la veturilon ĝis ŝia domo. Ĉiujn, kiuj volis malhelpi la justecon, kontraŭlabori ekzamenon de la kompatinda stato, pligrandigi la mizeron kaj puni senkulpulon, oni honoris per oficoj, pensioj kaj merit-signoj.

Plej ideale, tamen, evoluis la vivo en la urboj. En la reĝurbo loĝis tricent mil homoj sur spaco ne pli granda ol kelkaj kvindekoj da aroj. Vidante ĉi tiun ŝtontombon, kiu estis la fiero de la enloĝantoj, oni do povis tuj kalkuli sur kiom da ŝarĝoj da malpuraĵoj ĝi kuŝis, ĉar la urbon oni ne purigis ĉiutage.

Pro tio estiĝis malbonodoro, kiun la urbanoj ne sentis, sed kiu okazigis malsanojn. Al tio ankaŭ kunhelpis altgrade la ideala konstruadmaniero. Anstataŭ kuŝigi la domojn en terasojn kontraŭ la sunflanko, oni ja ilin konstruis en longaj vicoj, inter kiuj iris vojetoj tiel mallarĝaj, ke nur al malmulto el la loĝantoj la ĉambroj estis sufiĉe helaj. Same kiel ĉe certaj popoloj, loĝantoj en valoj inter altaj montoj, ankaŭ ĉi tie malsano naskiĝis, kiu sub la nomo de kretenismo ŝanĝigis la funkciojn de la cerbo, igante la idiotismon hereda.

La urbanoj do fariĝis tiel kretenaj, ke kamparano ne komprenis, kion ili parolas. Al ili do ĉiuj perceptoj tiel konfuziĝis, ke tiuj, kiuj tion povis, tage dormadis kaj

nokte manĝadis kaj trinkadis, kio ja kompreneble okazigis multe pli da malsanoj.

Amasigataj sur malgranda spaco ili sin daŭre interbataladis, kio ja tute ne estis mirinda, ĉar ili ja devis sin reciproke ĝeni, puŝi kaj piedpremi. La pligrandiĝantan kretenismon sekvis senhelpeco, kiu proksimume similis al tiu de la infaneco. Multajn milojn da ormarkoj oni pro tio devis pagi al gardantoj, kiuj sub la nomo de policanoj marŝadis sur la stratoj, hejmenkondukadis ebriulojn, hejmenportadis tiujn, kiujn renversis kaj premis veturiloj, kurante alportadis akvon al svenintoj, elserĉis domnumerojn, sciigis, kie loĝas la barbiro, kie troviĝas publikulinoj, kie brulas ktp.

Al tiuj idiotoj sin amase direktis el la kamparanaro ĉiuj tiuj junuloj kaj junulinoj, kiuj ne heredos bienon. La junulojn oni prenis kiel sklavojn; la junulinoj serĉis oficon kiel sklavinoj aŭ atendis, ke oni ilin okaze malvirtigos. En la urbo ja estis malfacile al junuloj edziĝi, kaj pro tio oni malvirtigis kun ilia propra kunsento kaj tiu de la polico ĉiujn filinojn, kies infanoj ne povus postuli ian okupon aŭ oficon.

Malfeliĉaj kiel ili do estis, ili serĉis konstantajn rimedojn en alkoholaĵoj, kiujn oni konsumis en publikaj ejoj. Ĉe ĉiu konsumado de granda kvanto da alkoholo, kio nur okazis en vira rondo, oni kutimis trinki apartan glason da alkoholo por la hejme restanta virino, kiu ne povis foresti de la infanoj, kaj unu glason por la hejmo, kie atendis lito kaj edzino. Ĉe vere grandaj okazoj por ebriiĝo oni komencis trinki grandan glason da alkoholo por la reĝo kaj unu por la patrujo, iafaje ankaŭ unu por la pura infera dogmaro.

Ĉi tiu idealsocio de tricent mil personoj pretendis labori por la bonstato de la popolo. Sed irinte matene

al la urblimaj impostejoj aŭ al la foirejoj, kien la kamparanoj alportadis manĝaĵojn al ili, oni ekvidis, kiu ilin nutras. Interŝanĝe de tio la kamparanoj ricevis iom da mono, kiun forprenis la impostoj; plie ili rajtis rigardi oleopentraĵojn, aŭskulti prelegojn, kiujn ili neniam havis tempon por aŭskulti, sed pri tio ili devis kulpigi sin mem, ĉar estis permesate aŭskulti ilin, kiam plaĉos al ili, kompreneble kontraŭ aparta pago; plie ili ricevis instruistojn, kiuj instruis al ili la inferan dogmaron kaj la laŭdlibron, kompreneble kontraŭpage, kaj dimanĉe plenan ĉerpilon da insultaĵoj de la pastro, kiu diris al ili, ke ili estas grandaj friponoj kaj ke oni ilin kastros, se ili ne pagos la impostojn. Ĉion ĉi tion, kion oni nomis la benataj fruktoj de la instruado, ili ricevis (kontraŭ pago), por ke ili alportu en la urbon manĝaĵojn al tiuj, kiuj mortus pro malsato, se unu matenon la kamparanoj preterlasus iri al la foirejo. Kaj tion oni povis kredigi al la kamparanoj!

Sed en la urbo ĉiam troviĝis malriĉuloj kaj malkontentuloj, kaj fine estis necese zorgi pri ili, ĉar ili fariĝis danĝeraj. Pro tio oni konstruis publikajn domojn de kompatemo, kiujn oni nomis malliberejoj, kie oni faris provojn por ekscii, je kiom malmulte da manĝaĵoj povas vivi homo. Kaj sciiginte tion, oni ektrovis, ke la laboristoj diboĉas. Kiam la laboristoj rifuzis labori, ĉar la laboro estis laŭvola, oni faris la laboron deviga, kaj per armiloj oni devigis ilin labori.

Fine kiam la malkontenteco kaj la ekscitiĝo fariĝis tro grandaj, la impostoj netolereblaj, kaj ĉar la tutan ŝuldon oni ĵetis sur la reĝon, ĉi tiu fine eltrovis novan sistemon de regado, kiun post multe da kverelo oni akceptis sub la nomo „parlamentara reĝimo“ aŭ „priresponda sistemo“. Same kiel multego da gazetredaktoroj

estis devigataj pro la leĝo pri preslibereco ĝin lerte eviti, anstataŭante sin per tiel nomataj respondeculoj, la reĝo do depost nun elektis ministrojn, kiuj prenis sur sin la respondecon por liaj malprudentaĵoj, kaj pro tio la reĝo estis ŝirmata kontraŭ ĉia akuzo. Sed la respondeco ne estis pli danĝera, ol ke ĝi havigos al ministro, kiun oni akuzis pro reĝa malprudentaĵo, eksigon por ekesti guberniestro kaj kerubkavaliro. Ĉi tiu ofico de respondeculo estis do tre oportuna kaj oni ĝin multe aspiris.

En plej proksima interrilato kun tio staris la trobabilad-sistemo aŭ parlamenteja sistemo. Aro da riĉaj homoj ĉiujare kunvenis, unu fojon serĉante per sagaca parolado elekti la sekvontan viktimon, sur kiun nova imposto estu ŝarĝota. Kiam ili estis tro sagacaj al si reciproke, ili pace interkonsentis, ne ŝarĝi la imposton sur sin reciproke aŭ ili interŝanĝis kaj brokantadis la impostojn.

Aparta kaj siaspece bona ekzemplo de ĉi tiu regada sistemo estis la parlamenteja leĝo, kiu traktis la metion de la tanistoj. Ses tanistoj jam faris dum 25 jaroj malbonan ledon por malbona prezo. Iutage la ĉasistoj, kiuj, loĝadis ankoraŭ en la najbaraĵo, ekpermesis al si la enkondukon de bona ledo por bona prezo. La popolo ĝojkrie bonvenigis la novaĵon, sed la ses tanistoj, kiuj havis sidlokon en la parolada ĉambrego aŭ parlamentejo, endonis petskribon pri limdepago por la ledo de la ĉasistoj. La enlandan industrion oni devu protekti, la idojn de la lando oni ne formanĝu ktp. Ili efektivigis la limdepagon de la ĉasista ledo! Kaŭze de ĉi tiuj ses tanistoj oni devigis la popolon daŭre aĉeti malbonan ledon je malbona prezo. Ĉi tiun agadon oni nomis protektagado, ĉar per ĝi oni protektis la privatan intereson kun malprofito de la publika. La respondeculo tamen opiniis, ke plej bone estas ekkapti la okazon por serĉi oficon

kiel guberniestro; li ŝajnis grandan ĉagrenon kaj eksigis. La oficon li ricevis kune kun la Keruba ordeno, per kiu oni kutimis rekompenci nur eminentulojn.

Sed plej bedaŭrinde el ĉio estis, ke la kretenismo iom post iom fariĝis naturdevena same kiel la korpaj malfortoj. La kretenuoj, kiuj nomis sin „Societo de la inteligenteco“ (de *intelligere* = kompreni), ĉar ili ne komprenis sian kretenismon (*lucus de non lucere*), iom post iom jam degeneris tiel, ke ili jam perdis la konscion pri sia cerbmoliĝo; male ili pretendis esti la plej saĝaj de la socio. Ĉar ili disponis pri la militistaro, la stato de la socio fariĝis plejeble simila al frenezulejo, kies pacientoj ribelis kaj internigis siajn kuraciston kaj gardantojn. Ĉi tio okazigis la plej kuriozajn scenojn. Oni do povis aŭdi, ke en la parolada ĉambrego oni pledis plej serioze por tiaj opinioj, ke *Atlantika*, kiel oni nun nomis la regnon, kiu posedis nur 50000 militistojn, povus sin defendi kontraŭ Akvilonia aŭ kiu ajn regno, kiu havis 20-oblan nombron da militistoj. Alian fojon oni sukcesplene pledis por la opinio, ke la socio falruiniĝus, se la popolo ne volus pagi imposton al certaj komediantoj. Alian fojon la ŝtato ruiniĝus, se la popolo ne volus doni salajron kaj profesorecon al sinjoro, kiu kolektis grandan nombron da certa speco de skaraboj, al kiuj li trapikis la korpon per zinkpingloj.

El la kutimo vidi, ke jaron post jaro oni prizorgis, pagis kaj aspiris la kretenismon, rezultis iom post iom, ke multe da malfeliĉuloj deziris partopreni la kretenismon, ĉar ĝi ja donis honoron kaj monon. Kaj nun ĝi estis diskonigota per la lernejoj, sed oni ne rapide antaŭeniris, ĉar la animoj de la popolo ankoraŭ alkroĉiĝis per la memoro al la pasinteco, kiu posedis multe da saĝeco, eĉ se ĝi estis malbona laŭ multaj rilatoj. Sed

daŭre vidante, ke oni ricevas ŝatatecon nur, se oni posedas la opiniojn de la potenculoj, oni devis kontraŭvole almenaŭ ripeti la aprobitajn opiniojn, eĉ ne havante ilin, kaj post kiam ili pene akiris la saman opinion kiel la alt-ranguloj, ĉi tiu opinio jam fariĝis eksmoda.

Rezultis do el ĉi tio senĉesa kurĉaso, eternaj konflikto kaj eksciteco en la socio kaj neniam laciĝanta malkontenteco. Kaj kiam la senpovuloj amase ribele kontraŭstaris la potenculojn kaj forrabis al ili la potencon, oni tuj ekvidis la malnovan staton sin renovigi kaj ripeti, tiel ke post ĉiu ribelo tiuj, kiujn antaŭ momento oni tirane premegis, fariĝis tiranoj, pri kio antaŭe ili neniam revis.

Jen la momento, kiam ĉiuj pensemuloj ekpripensis kun furiozo la demandon pri la plibonigo de la socio, kaj nombro da sektoj naskiĝis, kiujn entuziasmigis la sankta fervoro ĉesigi, kiom ajn kostos tio, la malfeliĉojn, la mizeron kaj la kverelemon.

Unu sekto, nomata „molleda skolo“ pledis por la opinio, ke la socion oni lasu grandiĝi laŭplaĉe kiel natura herbejo, kie herbo kaj herbaĉo interbatalu pri la nutraĵoj, eĉ kun la risko, ke la herbaĉo venkos kiel la plej forta.

Alia sekto, nomata la korporacianoj aŭ „skolo de malgrandaj birdoj“, predikis ĝeneralan unuigon de malgranduloj, malsanuloj, malfortuloj, malsaĝuloj, mallabor-emuloj, per kio la rajto de la malfortuloj, tirane premege la fortulojn, ricevu sankcion de la fundamenta leĝo.

Tria sekto, la „Boŝmanoj“, opiniis, ke la sola savo dependas ne de solvo de la demandoj, kiuj estas nesolveblaj, sed de ĝenerala eksplode farota detruo de la tuta planedo Tellus, kiu, ĉar kreita el nenio sekura, devu reiri al sia deveno.

Kaj dum kiam ĉi tiuj sektoj kaj aliaj interbataladis pri la hegemonio, la socio daŭre persistis je la malnova sistemo, serĉante en la pasinteco la pruvojn por la ĉiurilata bonegeco de la estanteco, akceptante malnovajn jam travivitajn formojn, dekretante decidojn kaj donante leĝojn, tiel ke neniam antaŭe tiom da konsento super-regis la regantojn, kiuj do opiniis kaj pruvigis, ke tio estas la vera Insulo de Feliĉuloj, dum ke al la regatoj ĉiam plifortigis la kredo, ke ĝi certe estas Insulo de Malfeliĉuloj.



INTERNACIA MONDLITERATURO

La kolekto estas submetita al la gvidado de **Prof. D-ro Joh. Dietterle**,
L direktoro de la Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko.

Ĝi enhavas nur la plej famajn verkojn el ĉiuj naciaj literaturoj. Ĝis nun aperis:

Volumo 1:

Goethe, J. W. von: Hermano kaj Doroteo. Eposo idilia. El la
germana originalo trad. *B. Küster*. 2a, korektita eldono. Kun antaŭparolo
de *Prof. D-ro Joh. Dietterle*. 1922. 77 paĝoj. Kartonita.

Volumo 2:

Niemojewski, A.: Legendoj. El la pola originalo trad. *B. Kuhl*.
Kun antaŭparolo de *Antoni Grabowski*. 2a, korektita eldono. 1923.
74 paĝoj. Kartonita.

Volumo 3:

Turgenev, Ivan S.: Elektitaj noveloj. El la rusa originalo trad.
A. Mexin. 1923. 81 paĝoj. Kartonita.

Volumo 4:

Raabe, Wilhelm: La nigra galero. Historia rakonto. El la ger-
mana originalo trad. *Prof. D-ro Fritz Wicke*. 2a, korektita eldono. 1922.
64 paĝoj. Kartonita.

Volumo 5:

Hildebrand: El la „Camera Obscura“. El la holanda originalo trad.
H. C. Mees. 1923. 64 paĝoj. Kartonita.

Volumo 6:

Irving, Washington: El la skizlibro. El la angla originalo trad.
H. L. Elvin. 1923. 64 paĝoj. Kartonita.

Volumo 7:

Chamisso, A. de: La mirinda historio de Petro Schlemihl.
El la germana originalo trad. *Eug. Wüster*. 1922. 84 paĝoj. Kartonita.

Volumo 8:

Stamatov, G. P.: Nuntempaj rakontoj. El la bulgara originalo
trad. *Iv. H. Krestanoff*. 1922. 80 paĝoj. Kartonita.

Volumo 9:

Ŝalom-Aleĥem. Perec.: Hebreaj rakontoj. El la hebreaj ori-
ginaloj trad. *Is. Muĉnik*. 1923. 78 paĝoj. Kartonita.

Volumo 10:

Puŝkin, A. S.: Tri noveloj. El la rusa originalo trad. *D-ro A. Fiŝer*.
1923. 67 paĝoj. Kartonita.

FERDINAND HIRT & SOHN EN LEIPZIG
ESPERANTO-FAKO

INTERNACIA MONDLITERATURO

Volumo 11—12:

Ariŝima, T.: Deklaracio. Romano. El la japana originalo trad. *T. Tooguu*. 1924. 125 paĝoj. Kartonita.

Volumo 13:

Poe, Edgar, Allen: Ses noveloj el „Rakontoj de mistero kaj imago“. El la angla originalo trad. *A. Frank Milward*. 1924. 80 paĝoj. Kartonita.

Volumo 14:

Balzac, Honoré de: La firmao de la kato, kiu pilkludas. El la franca originalo trad. *Paul Benoit*. 1924. 75 paĝoj. Kartonita.

Volumo 15:

Doroŝeviĉ, Vlas: Orientaj fabeloj. El la rusa originalo trad. *Nikolao Hohlov*. 1924. 64 paĝoj. Kartonita.

Volumo 16:

Ŝlenkiewicz, Henryk: Noveloj. El la pola originalo trad. *Lidja Zamenhof*. 1925. 64 paĝoj. Kartonita.

Volumo 17:

Strindberg, August: Insulo de feliĉuloj. El la sveda originalo trad. *Oskar Frode*. 1926. 69 paĝoj. Kartonita.

Volumo 18:

Bertrana, Prudenci: Barbaraj prozaĵoj. El la kataluna originalo trad. *Jaume Grau Casas*. 1926. 59 paĝoj. Kartonita.

Volumo 19:

Ŝimunoviĉ, Dinko: Ano de l'ringludo. El la kroata originalo trad. *Fran Janjiĉ*. 1926. 86 paĝoj. Kartonita.

Volumo 20:

Eekhoud, Georges: Servokapabla. Marcus Tybout. El la flandra (franclingva) originalo trad. *Léon Bergiers*. 1926. 80 paĝoj. Kartonita.

Prezo po volumo: Rm. 1.60

Duobla volumo: Rm. 2.50

Kvin volumoj laŭ elekto: Rm. 6.—

La kolekto estas daŭrigata.

FERDINAND HIRT & SOHN EN LEIPZIG
ESPERANTO-FAKO

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA

KUL

Esperanto

78 I